

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

4

1993

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO






**Ruino de eŭrop-stilaj konstruaĵoj en Yuanmingyuan-ĝardeno** Yuanmingyuan estis ĝardeno konstruita antaŭ pli ol 200 jaroj por imperiestra familio. En la ĝardeno estis multaj eŭrop-stilaj konstruaĵoj similaj al svisaj kaj francaj palacoj. La ĝardeno karakteriziĝas per arkitekturo ĉina kaj



eŭropa. La grandioza ĝardeno estis nomata "Reĝo de la ĝardenoj". Sed en 1860 la alianca armeo de Britio kaj Francio entrudiĝis en Pekinon, prirabis kaj forbruligis la ĝardenon.

Foto de YAN JIN



Koloraj skulptaĵoj sur firsto

Foto de **REN SHIYIN**

## INTER NI

### Opinioj de niaj legantoj

Kun granda atento kaj ĝojo mi legis la artikolon de Bernard Golden “Urĝe bezonata Plena Analiza Fonetiko” en la aprila numero de 1992 de EPCĈ. La aŭtoro priskribas kaj pritraktas tre gravan lingvan problemon, kiun ni esperantistoj certe ĉiuj konas. Bedaŭrinde tiu problem

ne trovis ĝis nun sufiĉe da atento ĉe niaj estraranoj de UEA, almenaŭ laŭ mia opinio. Tial estas meritoplene kaj bone, ke Bernard Golden en granda mondfama kaj ofte legata revuo kiel EPCĈ mencias kaj pritraktas tiun problemon. Oni nur povas esperi, ke la proponoj de la aŭtoro trovos la atenton de la kompetentaj estraranoj de UEA. La variado en la prononco de Esperanto estas grandega.

**MANFRED UHLENDORFF**  
(Germanio)

Mi opinias, ke la prononcproblemo estas tre grava por iu ajn lingvo, precipe por Esperanto, kiu sin proponas kiel lingvon parolatan de la tuta homaro. Mi tute konsentas kun s-ro Bernard Golden pri la konkretiĝenda ideo ellabori urĝe bezonatan Plenan Analizan Fonetikon.

**HILARINA AIRES**  
(Brazilo)

La aŭtoro de “Promenado inter la numeraloj”, artikolo en la 6-a numero de 1992 de EPCĈ, esploris aferon kun atento kaj analizkapablo, kiujn havas verŝajne nur ne-eŭropano. Ni eŭropanoj ja vere — kiel la artikolo mencias — ne ekvidas, ke “en la numeralan sistemon enŝteliĝis kelkaj neregulaĵoj, kio iom komplikis la sistemon...” La aŭtoro donas multajn ekzemplojn, kiuj trafe pravas, ke necesas formeti kelkajn ĝisnunajn lingvajn kutimojn, en intereso de pli facila kompreneblo kaj utiligo de Esperanto por ne-eŭropanoj. Do ni devus estonte elparoli legante: “1 000 001 da homoj” pli ĝuste: “milion unu homoj”. La vorteto “da” estas verŝajne tute superflua.

**BRUNO VOGELMANN**  
(Germanio)

*Urĝe bezonata: PAF (Plena Analiza Fonetiko) kaj “Promenado inter la numeraloj” montris problemojn pri fonetiko kaj numeraloj kaj vekis la atenton de niaj legantoj. Studo de tiuj problemoj estas utila por normigi elparolon de Esperanto kaj reguligi uzon de la numeraloj. Ni esperas, ke la lingvistoj kaj legantoj turnos la atenton al tiuj problemoj, kaj artikoloj tiurilataj estas bonvenaj.*

**La Red.**

## ENHAVO

### 13 REFORMADO:

Pri la sistemo de la socialisma merkata ekonomio de Ĉinio (1)

### 6 Tridimensia agrikulturo en Miyi

### 12 Ĉinio nuligas medikamentojn falsajn kaj malbonkvalitajn

### 37 HISTORIA MISTERO:

Ĉu sur hirundo aŭ suŝuang-birdo?

### 20 Sporto de bravuloj

### 40 Strebado de ĉina komponisto

### 27 ARTOJ DE ĈINIO:

Liu Wannian strebas por pentri veran Tibeton

### 50 EL ĈINAJ GAZETOJ

### 34 Mia naskiĝloko Leting

### 22 Inventinto de hibridigita rizo

### 42 Gajaj makakoj

### 45 MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ:

Kolektiva amuzaĵo en la 15-a de la unua monato

### 51 LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (XVII):

Vojo al la ĉielo

### 8 Budhisma sanktejo Wutai-monto

### 26 ITINERO PROPONITA:

Vojaĝo en Tibeto

### 19 Verda revolucio leviĝanta

### 44 AMUZOJ

### 48 KURANTAJ AFEROJ

### 14 Konatiĝo kun fraŭlino Sabira

### 18 Nin amikigis Esperanto

### 30 SUR NIA LIBROBRETO:

Du libroj el Japanio

### 39 POR KOMENCANTOJ:

La sorĉita floro

### 17 ESP-NOVAĴOJ

### 4 INTER NI

### 16 KORESPONDI DEZIRAS

### SUR LA KOVRILLO:

Li-a knabino

Foto de YAN JI

### 2 Ruino de eŭrop-stilaj konstruaĵoj en Yuanmingyuan-ĝardeno

### 4 Koloraj skulptaĵoj sur firsto

### 24 En stratetoj de Chengdu

### 36 Tropikaj floroj

### 31 En la antikva urbo Qingzhou

### SUR LA DORSKOVRILO:


### [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

La haveno de Oslo

En fagarbaro en printempo

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Miyi-gubernio (p. 6)
2. Wuwei-gubernio (p. 37)
3. Leting-gubernio (p. 34)
4. Jiyuan-gubernio (p. 42)
5. Houma (p.45)
6. Wutai-monto (p. 8)
7. Tibeta Aŭtonoma Regiono (p. 26)



# Tridimensia agrikulturo en Miyi

**N**UR hazardo konatigis min kun la estro de Miyi-gubernio. Je mencio pri agrikulturo en la gubernio, bruna kaj maldika, li kun ĝojo diris al mi, ke antaŭ ok jaroj en la gubernio komenciĝis la eksperimento pri agrikulturo per scienca metodo de tridimensia agrikulturo. Nun la produktokvanto de greno altiĝis, ekonomiaj plantoj multiĝis kaj la enspezo de la kamparanoj pliiĝis.

Kio estas tridimensia agrikulturo? Por kio ĝi necesas en la gubernio? Ĉu ĝi estas vere riĉiga? Kun ĉeno da demandoj mi vizitis la gubernion.

Miyi situas en sudokcidenta Sichuan-provinco de Ĉinio. Ĝi estas malgranda el la 2 000 gubernioj. Ĝin favoras naturdotitaj kondiĉoj. Topografie, Miyi situas ĉe altebenaĵo. En ĝi ondas montoj kaj interkruciĝas kanaloj kaj valoj, je 980-3 447 m super la marnivelo. En la gubernio regas tropika klimato de suda Azio, la temperaturo estas alta kaj sunlumado longa. La topografio kun diversgradaj regionoj faras diversgradan tridimensian strukturon de klimato, t.e., en la sama tempo tie regas klimato de la kvar sezonoj kaj en la sama loko la vetero malsamas. Tie kreskas ne nur plantoj de subtropika kaj malvarmega zonoj, sed ankaŭ fruktoj kaj legomoj de tropika zono.

Tamen, dum multaj jaroj, kiel en aliaj lokoj de Ĉinio, en la gubernio oni ĉefe kulturis grenplantojn. Oni kultivis laŭ la metodo en la jaro: rizo-tritiko; printempa-aŭtuna rizo; kaj tritiko-rizo-rizo. Ĉe la rivervalo neblas rikolti trifoje en la jaro. Tie en frua printempo la temperaturo rapide altiĝas kaj tritiko maturiĝas sub alta temperaturo, kun pohektara produktokvanto de nur 3 000 kg. Kaj la malfrua rizo donas malaltan produktokvanton pro nesufiĉa maturiĝo kaŭzita de senĉesa pluvado. Sub tiu nerezistebla klimato la grenproduktokvanto estis nek alta nek stabila, ke la vivo de la kamparanoj longtempe restis en la stato de mezhava nivelo.

Post 1983 Miyi-anoj trovis la vojon plene utiligi la naturajn kondiĉojn, nome disvolvi tridimensian agrikulturon. Laŭ la opinio de fakuloj, la tridimensia agrikulturo estas: Surbaze de la principo de la sistem-teorio la funkcio de la tuto estas pli forta ol tiu de la sumo de ĉiuj partoj, el la makrovidpunkto fari ĉiuf flankan planadon de la sinteza utiligo de naturaj kaj ekonomiaj riĉfontoj kaj akorde ekspluati riĉfontojn por bone disvolvi agrikulturon, forstumadon, brutobredadon, akcesoran okupon kaj fiŝkaptadon por atingi plej bonan kompletigan strukturon kaj altigi la ĝeneralan funkcion de la agrikultura sistemo. Tamen Miyi-anoj diris, ke tia agrikulturo signifas plene utiligi tempon kaj spacon por

rikolti maksimuman efikon per minimuma elspezo. Kiel opinias fama ĉina agronomo Lu Liangshu, ĝi estas la plej bona metodo disvolvi agrikulturon en montregiono.

Por ke la kamparanoj propraokule vidu la profiton donitan de la metodo, ĉe la komenco la gubernio praktikis la alternan kultivadon "maizo-rizo; legomo-rizo", kiu donis altan produkton. Ni prenu la alternan kultivadon de legomoj kaj rizo kiel ekzemplon. Kompare kun la metodo "rizo-tritiko kaj printempa-aŭtuna rizo", ĝi ebligas pli plene utiligi sunon kaj akvon. De januaro ĝis majo ĉiujare, seka sezono regas en Miyi. Ĝi favoras al la kresko de legomoj. De junio ĝis oktobro tie regas pluva sezono. Ĝi taŭgas por kreskigi rizon. T.e., plene utiligi naturajn kondiĉojn por gajni riĉan rikolton. Kvankam la grenplantado reduktiĝis, tamen la pohektara produktokvanto atingis 7 500 kg. La pohektara profito de legomoj estis 15 000 juanoj, trioble pli ol la antaŭa. En la sekvantaj ok jaroj Miyi-anoj kreis dekojn da modeloj de tridimensia agrikulturo. Ili estas ĉefe: strukturoj ebena, vertikala, tempa kaj ĉenmangaĵa. Tial, la agrikulturo de la gubernio formis makroagrikulturan sistemon de ĉioampleksa planado kaj akordiĝo en la tuto, kio akcelis plantadon, bredadon kaj prilaboradon. La bazoj por grenplantoj, legomoj, sukercano kaj fruktoj havas rudimentan formon. En 1991 la poka-



Sur kampo de Miyi, kie oni mikse kulturas rizon, morusarbojn kaj sukerkanojn

pa enspezo de la kamparanoj kreskis de 214 en 1983 al 770 juanoj, pli multe ol tiu de la kamparanoj de la tuta lando.

Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj. En profunda aŭtuno Miyi estis ornamita per verdaj montoj kaj bluaj riveroj kiel kutime. En pluva nebulo la montoj kaj kampoj aspektis pli ĉarmaj. Mi trairis padon post pado inter kampoj, jen karesis legomojn, jen paŝis sur rizkampo. La pluveto tramalsekigis miajn vestojn, kio donis al mi agrablecon.

Mi haltis sur peco da ŝenoprazo-kampo de Qingpi-vilaĝo. Legomkulturisto diris al mi, ke antaŭe ili kultivis nur grenplantojn, kaj poste kultivis samtempe legomon kaj grenplantojn sur sama kampo. Ili povas rikolti varmbedan ŝenoprazon trifoje en jaro. La pohektara produktokvanto de varmbeda ŝenoprazo kaj verda ŝenoprazo atingas 60 000 kg kaj la pohektara enspezo 75 000 juanojn. Fingre montrante al nova domo proksime de la legomkampo, li diris, ke en la vilaĝo staras dudekelkaj tiaj domoj. La domo estas trietaĝa. La mastro estis plektanta bambuan korbon sur la vaka loko antaŭ ĝi. Li kaj liaj familianoj laŭkontrakte prilaboras seponon da hektaro da kampo, sur kiu ili kultivas nur tomatojn. Por kio necesas

tiom da bambuaj korboj por la kampo? Ĉar multaj kamparanoj ĉirkaŭe kultivas tomatojn. Kiam venas rikolta sezono, li aĉetas tomatojn de ili, antaŭ ol vendi aliloke.

Forlasante la vilaĝon, mi informiĝis de gubernia oficisto, ke en la rivervalo regiono de Miyi regas alta temperaturo kaj tieaj legomoj elkreskas du monatojn pli frue ol tiuj en norda Ĉinio. En Pekino, Chengdu kaj la Nordoriento vendiĝas legomoj el Miyi. La fruaj legomoj okupas gravan lokon en la ekonomia disvolviĝo de la loko.

Kreskigi morusarbojn kaj bredi silkraŭpojn sur nekulturataj kampoj estas grava entrepreno de la tridimensia agrikulturo de Miyi. Teknikisto Li Dinggang kondukis min en morusarbaron de Zhongba(Gongba)-vilaĝo. Tie oni kultivas grenplantojn kaj morusarbojn sur sama terpeco kun bona profito. La vergoj de morusarbo estas uzataj kiel brulligno aŭ subportilo de budo; la vergoŝelo kiel materialo por fari paperon kaj la fekaĵo de silkraŭpo kiel sterko. Pro ĉiujara hakado la vergoj ne estas dikaj, tamen kun grandaj delikataj folioj. Starante inter morusarboj, mi aŭdis ilin susuri kaj sentis, ke ili kvaŝaŭ rakontas ion.

Ĉu alterna kultivado de plantoj

kaj samtempa kultivado de plantoj sur sama terpeco, ĉu la dispozicio de grenplantoj, morusarboj, legomoj kaj fiŝkaptado, ĉiuj apartenas al la ebena aŭ tempa strukturo de la tridimensia agrikulturo. En la fruktoĝardeno de la subdistrikto Lianhua mi vidis la vertikalan kaj ĉenmanĝajan strukturojn de la tridimensia agrikulturo. La fruktoĝardeno, konstruita antaŭ kelke da jaroj sur dezerta monto, estas konsistiga parto de la ekonomia strukturo de la gubernio. Interese, ĝardenistoj kultivas arakidojn sub oranĝarboj kaj manĝigas porkojn per arakidaj folioj. La porka fekaĵo estas uzata por fari metanon, kiu tamen kreskigas kaj freŝigas fruktarbojn kaj mortigas fiinsektojn, tiel formiĝas cirkula sistemo de la ĉenmanĝaja strukturo.

En verda oranĝarbaro sur la montodeklivo, mi bone komprenis, kion do signifas la vertikala strukturo. Rigardante supren, mi vidis prosperajn verdajn arbojn unuj super aliaj kaj rigardante malsupren, mi vidis verdaĵon kunfandiĝantan kun vastaĵo de flavaj kampoj. La diferenco inter topografio kaj klimato faras vertikalan dislokigon de naturaj riĉfontoj kaj kaŭzas ŝanĝigon-al la kombiniĝo de specioj de vegetaloj. La Miyi-anoj bone konas la leĝon de la ŝanĝiĝo, kaj tio kondukas ilin al riĉeco. ■

# Budhisma sanktejo Wutai-monto

Teksto de LI ZHI

Fotoj de YAN JIN



La halo Wuliang

**W**UTAI-MONTO estas unu el la plej famaj budhismaj sanktejoj de Ĉinio. La loko ĉiujare akceptas milojn kaj dek-milojn da pilgrimantoj kaj turistoj. Ankaŭ mi kun granda intereso vizitis ĝin en aŭtuno de la lasta jaro.

La monto situas okcidente de norda Ĉinio. Ĝi havas alian nomon Tepida Monto pro tio, ke eĉ en somero tie regas malvarmeto. Wutai-monto havas kvin pintojn kun ebena supro. Inter la kvin montpintoj estas urbeto Taihuai, kaj norde de ĝi estas malgranda monto Grdhrakuta (sankta aglo). Antikva budhisma libro notas, ke antaŭ ĉirkaŭ 1900 jaroj famaj hindaj bonzoj Kasyapa-Matanga kaj Dharmaratna venis al Ĉinio por prediki budhismon. Veninte al Taihuai, ili trovis, ke tie estas monteto tre simila al la hinda monto Grdhrakuta, kie memkulturis Ŝakjamunio, kaj ankaŭ nomis tiun malgrandan monton Grdhrakuta. De tiam mandarenoj kaj budhistoj venadis al Wutai-monto por konstrui templojn. Senĉesa konstruado faris la lokon budhisma sanktejo. Oni

diris, ke en la plej prospera periodo tie estis pli ol 300 temploj. Nun 47 el ili restis nedetrinitaj, kaj plejparte sin trovas en la urbeto Taihuai.

La monto Grdhrakuta estas nomata ankaŭ Bodisatva Supro. Oni diris, ke tie loĝis bodisatvo Manjusri, disĉiplo de Ŝakjamunio. Li estas simbolo de saĝo kaj forto. Antikva budhisma libro notas, ke bodisatvo Manjusri predikadis en Wutai-monto. Dank' al tio Wutai-monto fariĝis la plej respektata budhisma sanktejo de Ĉinio.


La vojo al la Bodisatva Supro, kiu havas 108 ŝtupojn, estas tre kruta. Kiam vi atingos la supron spiregante, vi havos senton de agrableco kaj respekto. Vi ĝuos belan panoramon de la tuta urbeto kaj forgesos portempe ĉiajn ĉagrenojn.

Inter la ĉinaj budhismaj sanktejoj, Wutai-monto estas unika loko, kie troviĝas kaj temploj de han-nacia budhismo kaj temploj de lamaismo. Ĉiuj tiuj lamaismaj temploj apartenas al la flava sekto, la plej granda el la sektoj de lamaismo. La kortego de Qingdinastio (1644-1911) praktikis pa-

cigan politikon rilate al la mongoj pere de la doktrino de la flava sekto, kio prosperigis lamaismon de Wutai-monto. Ĝuste en tiu tempo oni konstruis lamaisman templon sur la Bodisatva Supro, imitante la imperiestran palacon. La tegmentoj de la templaj haloj estis tegolitaj per flavaj, verdaj kaj indigaj tegoloj. La halo por bodisatvo Manjusri en la templo estas nepre vizitata de pilgrimantoj. Kiel la plej granda templo de la flava sekto de lamaismo en Wutai-monto, ĝi altiras sennombrajn lamaistojn de foraj lokoj. Ili pilgrimas farante plej sinceran adorkliniĝon, nome je ĉiu paŝo ili kuŝigis sin sur la tero laŭeble etendante la membrojn, por montri sian piecon.

El la templaj konstruaĵoj de Wutai-monto, la Blanka Pagodo en Tayuan-templo estas la plej okulfrapa. La pagodo altas 63 metrojn, kun perimetro de 75 metroj. Sur la pagodo pendas 252 bronzaj tintiloj, kiuj ĉarme sonoras en vento. Laŭdire la Blanka Pagodo estas konservejo de relikvojoj de la Budho, tial la pagodo estas plej multe incensata, kaj fariĝis simbolo de Wutai-monto. En la templo konserviĝas pli ol





En la ĉambro, kie loĝis majstrino Tongyuan

20 000 sutraj libroj en la hana, mongola kaj tibeta lingvoj. Pli ol 2 000 el ili estas valoraj manuskriptoj perfekte reviziitaj. En la temploj de Wutai-monto oni jam kolektis 39 800 sutrajn librojn, ege valorajn por studo pri budhismo.

Xiantong-templo estas la unua templo en Wutai-monto, konstruita en 68 p.K., laŭ la peto de la famaj bonzoj Kasyapa-Matanga kaj Dharmaratna. Ĝi estas unu el la fruaj temploj en Ĉinio, kaj ankaŭ unu el la fontoj de budhismo. Xiantong ankaŭ estas la plej granda templo en Wutai-monto. En la templo 7 haloj sidas sur la sama akso, ĉiu kun aparta arkitektura stilo. El ili la plej alta estas la halo Wuliang, kiu havas neniun trabon en si.

Oriente de Tayuan-templo estas Rahula-templo. Rahula, filo de Ŝakjamunio, bonziĝis en la aĝo de 15 jaroj, diligente memkulturis kaj fariĝis unu el la dek disĉiploj de la Budho. En la templo estas multaj haloj kaj statuoj kun evidenta lamaisma stilo. En la templo la plej interesa estas "Amitabo en Lotuso" de ligna strukturo. Kun turnigado de lo-

tusforma soklo, granda ligna lotuso malrapide disvolviĝas kaj aperas en la floro kvar statuoj de Amitabo. Multaj pilgrimantoj prenas vidon de florado kiel la plej feliĉan spertaĵon dum sia tuta vivo. En Rahula-templo la lamaoj en kasajo kaj masko prezentis por ni diservan ceremonion de lamaismo.

Pushou-templo estas monaĥinejo. Ŝajne ĝi estas pli mistera ol la ordinara temploj. Tre fama majstrino Tongyuan memkulturis en tiu templo. En 1937 ŝi estis diplomita el la Beiping-a Virina Literatura kaj Scienca Instituto (Beiping estis malnova nomo de Pekino antaŭ 1949). En 1940 ŝi monaĥiniĝis. Ŝi memkulturis ĝis perfekta grado. En 1991 ŝi forpasis. El ŝia cindro oni trovis pli ol 7 000 grajnoformajn relikvojn, kaj malgranda parto de ili estas konservata en ŝia ĉambro. En Wutai-monto vivis multe da famaj bonzoj kaj majstroj, kaj dank' al ili budhismo en Ĉinio kaj Wutai-monto postvivis multfojajn persekutojn.

Dum restado en Wutai-monto, mi havis la ŝancon manĝi kune kun bonzoj. En la manĝejo longaj

tabloj staris laŭ la muroj. Antaŭ ĉiu manĝanto estis malgranda vazo kun floroj, bovlo, telero, tetaso kaj paro da manĝbastonetoj. Antaŭ manĝo iu majstro murmuris sutrojn, kaj malsupera bonzo faris profundan riverencon, elprenis pinĉon da manĝaĵoj el la bovlo kaj jetis ĝin eksteren tra la fenestro, en esprimo de kulto al dioj kaj diabloj.

La manĝaĵo estas vegetara, tamen tre nutra. Ĉefaj materialoj estas fritita ignamo, vermiĉelo el faba amelo, ĝerminta sojfabo, brasiko, orelfungo, sekigita taglilio, fritita tohuo, hidno k.s. Krome la bonzoj manĝas kaĉon el milio kaj jujubo. Ankaŭ la kaĉo estas tre nutra.


Por manĝado estas rigoraj disciplinoj. La manĝantoj ne devas sonigi la bovlon per manĝbastonetoj, ne ŝmaci dum la manĝado, nek malŝpari manĝaĵojn. Post manĝo ili devas stakigi siajn bovlojn kaj meti la manĝbastonetojn direkte al sia brusto por esprimi, ke ili ne plu bezonas manĝaĵojn. La manĝadon akompanas agrabla budhisma muziko, kaj ankaŭ ni laikoj ŝajne iluminiĝis pri la abstrakta mondo de budhismo. ■





La Blanka Pagodo en Tayuan-templo

Prezentado de lamaisma rito

Foto de LI QIANG





Templos sur Wutai-monto. La plej alta estas la Bodisatva Supro.

La "Amitabo en Lotuso"



# Ĉinio nuligas medikamentojn falsajn kaj malbonkvalitajn

**E**KDE la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la ŝtato ĉiam rigardas la kuracadon kiel bonstatigan aferon. La oficistoj kaj laboristoj ĝuas senpagan kuracadon. Tiam la medikamentoj kostis malmulte. La medikamentoj definitive fariĝis varoj nur en la 80-aj jaroj. En la tempo, kiam oni rimarkis la bonan profiton de la medikamentoj, la ŝtato ne donis sufiĉan atenton al ilia administrado, kaj oni produktis diversaspecajn falsajn kaj malbonkvalitajn medikamentojn. Tiu fenomeno kaŭzis seriozan rezulton siatempe.

Estis ege maltrankviligaj la raportoj el la provincoj Shandong kaj Sichuan. En la somero kaj aŭtuno de 1992 granda kvanto da falsa injektaĵo kanamicino kun marko de iu ŝanhaja farmacia fabriko aperis en la ĉina kamparo, kio grave damaĝis la aplikantojn. Tio estis unu el la kazoj pri falsaj medikamentoj sur la medikamenta merkato de Ĉinio en la lastaj jaroj. Fabriki kaj vendi falsajn kaj malbonkvalitajn kuracilojn jam fariĝis rimarkinda socia damaĝo. En la kamparo ĝi minacas la homan vivon.

Fakte, vendado de falsaj medikamentoj inter la popolanoj aperis ne hodiaŭ. En la pasinteco falsaj medikamentoj troviĝis nur inter valoraj drogoj, sed nun inter la falsaj medikamentoj troviĝas ne nur la tiel nomataj malfacile troveblaj drogoj, sanprotektajoj, sed ankaŭ altprofitaj eŭropaj medikamentoj kaj dozitaj ĉinmedicinaj medikamentoj. La enketo farita de la Ŝtata Medikamenta Administracio montris, ke la marko kaj pakumo de iuj falsaj medikamentoj estis imitaĵoj de tiuj de la famaj medikamentoj. Iuj fabrikis la tiel nomatajn medikamentojn el amelo, aliaj nekuracantaj materialoj

kaj eĉ materialoj malutilaj al la homa sano, dum aliaj ŝanĝis la markon de malmultekostaj kaj eĉ ne plu uzeblaj medikamentoj per nova marko por ŝajnigi ilin valoraj kaj tre facile vendataj medikamentoj. La enketo diris, ke la falsajoj plejparte estis faritaj de malgrandaj subteraj farmaciaj fabrikoj. Oni vendas la falsajn medikamentojn je malalta prezo, ŝmirante la manojn de la aĉetistoj per alta kurtaĝo, tiamaniere la falsaj medikamentoj vidiĝis ĉie en la neleĝaj medikamentaj bazaroj kaj de tie oni portis ilin al la vilagaĵ kuracejoj kaj privataj klinikoj. Oni ankaŭ vendas ilin je malaltaj prezoj al guberniaj medikamentaj kompanioj kaj distriktaj hospitaloj. Nun spuroj de falsaj kaj malbonkvalitaj medikamentoj vidiĝas jam tra la tuta lando. La ĉefaj suferantoj estis kamparanoj. Ja estis malfacile kalkulebla la nombro de malsanuloj, kies malsano graviĝis pro falsaj medikamentoj, kaj iuj eĉ mortis pro la falsaj kaj malbonkvalitaj medikamentoj.

Por ĉasi altan profiton iuj kontraŭleĝaj vendistoj profitis de neperfekteco de leĝoj kaj malsevera puno de la medikamento-falsistoj. Tio evidentigis ankaŭ la mankojn de Ĉinio en la administra sistemo pri medikamentoj. Nun estas pluraj administraj departementoj pri fabrikado kaj vendado de la medikamentoj, tamen iliaj devoj ne estis klare difinitaj, rezulte de tio oni ne povis doni severan punon al la kontraŭleĝa fabrikado kaj vendado de la falsaj medikamentoj. En iuj lokoj la gvidaj instancoj subtaksis la specialecon de medikamentoj kaj rigardis ilian vendadon kiel tiun de ordinaraj varoj libere vendataj kaj rezulte de tio la kontraŭleĝaj vendistoj povas facile friponi en la bazaro.

En 1992 la ĉina registaro starigis reguligan grupon

*(Daŭrigo sur p. 39)*

*En la lastaj dekkelkaj jaroj, por rapidigi ekonomian disvolviĝon, Ĉinio alprenis ekonomiajn metodojn, kiaj akcia sistemo, privata ekonomio kaj merkata ekonomio, kiuj estis rigardataj kiel proprajoj de kapitalismo. Tio kaŭzis dubon aŭ miskomprenon al niaj legantoj. Ĉi tie ni koncize klarigu iujn problemojn zorgatajn de niaj legantoj. Eble tio helpas al ili bone koni la reformadon de la ekonomia sistemo de nia lando.*

**La Red.**

# Pri la sistemo de la socialisma merkata ekonomio de Ĉinio (1)

de DA WEI

**A**NTAŬ 4 monatoj, la 14-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazinta en Pekino faris gravan decidon: La ĝenerala celo de la reformado de la ĉina ekonomia sistemo estas starigi la sistemon de socialisma merkata ekonomio, kio estas nova grava paŝo de la politiko de reformo kaj pordmalfermo en Ĉinio.

Dum longa tempo oni rigardis planizitan ekonomion kaj merkatan ekonomion kiel kriterion por distingi socialismon disde kapitalismo, pro tio ke de la naskiĝo kapitalismo estas akompanata de la sistemo de merkata ekonomio, dume socialismo — de la sistemo de planizita ekonomio. Estis same ankaŭ en Ĉinio. Kvan-kam abisme malsamaj estas la opinioj de la orientaj kaj okcidentaj ekonomikistoj pri la du sistemoj, tamen plejparto el ili rigardis la sistemojn kiel speguliĝojn de la sociaj sistemoj.

Kompreneble, la planizita ekonomio ludis pozitivan rolon por starigi la socialisman sistemon en la frua

periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Tiam en Ĉinio regis malriĉeco kaŭzita de multjara milito. Dank'al la praktiko de la sistemo de planizita ekonomio, la Ĉina Centra Popola Registaro koncentris grandan nombron da monrimedoj, materialoj kaj laborfortoj por fari fundamentan konstruadon. En la periodo de la Unua kaj Dua Kvinjaraj Planoj Ĉinio finkonstruis sume 156 gravajn projektojn, kiaj la Unua Aŭta Fabriko de Changchun (Ĉangĉun), Traktora Fabriko de Luoyang (Lŭojang) kaj Ferŝtala Fabriko de Wuhan (Uhan), tiel ke rapide disvolviĝis la nacia ekonomio. Tamen, la alte koncentrita planizita ekonomio malkaŝis sian mankon kun la kresko de la skalo de ekonomia aktivado. Ĝuste kiel koncernaj fakuloj analizis, la planizita ekonomio estas ekonomio de oficistoj. La registaraj oficistoj decidis kion kaj kiom produkti kaj efektivigis la decidon per administraj rimedoj, ke pli kaj pli akriĝis la kontraŭdiro inter plano kaj bezono, aliflanke, la produktantoj havis nenian rajton de memdecido. Por produkti ion ili devis antaŭ ĉio ricevi la konsenton de dekkelke, aŭ eĉ dekoj

da registaraj departementoj. Fine, la troa koncentrado kaj troa administrado malvigligis ekonomion.

En la 80-aj jaroj, la reformo kaj pordmalfermo vidigis la pozitivan rolon de la merkata ekonomio. Plej rimarkindis, ke oni povas aĉeti preskaŭ ĉion per mono. Tamen, antaŭ dekkelkaj jaroj, ĉinoj devis uzi bileton por aĉeti ŝtofon. En 1992, la ĉina nacia produktovaloro je 12% pli grandigis ol tiu de 1991. La merkata ekonomio, kiel mano nevidebla, akcelis la produktan disvolviĝon kaj riĉigis la varojn.

La sudorienta marborda regiono de Ĉinio la unua ekpraktikis la politikon de reformo kaj pordmalfermo, tial ĝi plej frue spertis la supercon de merkata ekonomio. En la Delto de Perlo-rivero ŝtalaj materialoj, ŝtofoj, legomoj kaj aliaj ĉiuj povas esti vendataj sur merkato. La produktado de fridujoj kaj elektraj ventumiloj en Ĉinio jam superis la bezonon de la klientoj, tamen ankoraŭ konstruiĝis la Zhujiang (Ĝuĝjang)-a Friduja Fabriko kun jara produktokvanto de 300 000

(Daŭrigo sur p. 16)

# Konatiĝo kun fraŭlino Sabira

## RENKONTIĜO KUN FRAŬLINO SABIRA

Komence de la vintro de 1992, kolektiĝis en Pekino ĉ. 100 reprezentantoj el pli ol 50 junularaj organizoj de la mondo por partopreni la 18-an Kolektivian Konsulton de Neregistaraj Junularaj Organizaĵoj, kiun aranĝis la Ĉina Junulara Federacio komisiite de Unesko. Finna knabino Sabira, vicprezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO), kiel ĝia reprezentanto kaj mi kiel ĝia observanto kune ĉeestis la konsulton.

Matene de la 10-a de novembro, mi renkontiĝis kun ŝi en la salono de hotelo. Ŝi salutis min laŭ la ĉina maniero. Kvankam ŝi scipovas la ĉinan lingvon, tamen ŝi flue parolis kun mi en Esperanto. Ŝi diris, ke ŝi trifoje venis al Ĉinio kaj vizitis multajn lokojn en ĝi. Ŝi studas ĉefe pri literaturo kaj historio de Azio en la Azioafrika fakultato de la Helsinka Universitato. Ŝi tre interesiĝas pri budaismo en Ĉinio kaj Hindio. Ŝi esploras la historion de la pilgrimado de monaĥo Xuanzang (Ŝjūanzang), kiu vojaĝis okcidenten por peti budaismajn sutrojn antaŭ 1 000 jaroj. Ĉi-foje ŝi kunportis sian verkon titolitan "Pilgrimo, Legendo, Pentraĵo — la

Fenomeno Xuanzang". Ŝi havas la belan ĉinan nomon "Sa Bilan". "Sa" signifas ĉinlingve "bodisatvo", kaj "Bilan" kvietecon kaj elegantecon.

Ŝi diris, ke ŝi tre ŝatas Pekinon. Post la diplomitiĝo en 1993, ŝi studos pri la lingvoj kaj kulturoj de la ĉinaj mongoloj, uĝuroj kaj juguroj en la Centra Instituto de Nacimallimulatoj de Pekino. Poste, ŝi venos al Germanio por doktoriĝi.

## GEJUNULOJ DONU SIAJN FORTOJN

Pro Esperanto mi kaj Sabira ĉiam estis kune dum la konsulto. Ĉeestante unuafoje tian kunvenon, mi sentis maltrankviliĝon kaj timemon. Sciante pri tio, Sabira instigis min paroli kun fremdlandanoj kiel eble plej multe por min ekzerci.

Ĉiumatene ŝi frue venis al la kunvenejo. Ŝi atente aŭskultis kaj varme diskutis. Ŝi petis min ne resti kun ŝi en sama grupo, por ke ni kolektu pli da opinioj el diversaj flankoj. Malgraŭ ke en la kunveno estis aranĝita sinkrona interpreto en la lingvoj angla, franca kaj ĉina, la reprezentantoj ankoraŭ ne povis bone kompreni unu alian pro lingva baro. Tiam fraŭlino Sabira donis sian opi-

nion, ke Unesko devas turni sufiĉan atenton al la lingva problemo. Ŝi diris, ke la lingvo kiel komunikilo ludas gravan rolon en internacia kunveno. Ofte okazas, ke pro lingva baro oni ofte miskomprenas unu alian kaj eĉ kverelas inter si, kaj tiel malŝpariĝas tempo, mono kaj energio. Ŝi proponis, ke Unesko malmultigu oficialajn lingvojn kaj difinu unu lingvon kiel la komunan lingvon de internacia kunveno, por ke ĉiuj partoprenantoj glate atingu komunan konon.

La reprezentanto de Unesko kaj gvidanto de la kunveno diris, ke necesas malmultigi oficialajn lingvojn, ŝpari monon elspezitan por interpretado kaj urĝi la junulojn lerni kaj paroli saman lingvon. La dirita opinio ne kontentigis fraŭlinon Sabira. Sed Unesko donis atenton al la lingva problemo, tio montras, ke ĝi simpatias nian aferon.

Dum la kunveno mi lernis de ŝi la aktivan pensmanieron: Ĉiu homo kaj ĉiu organizaĵo rajtas esprimi siajn opiniojn kaj proponojn en kunvenoj. Oni devas aktive agi. Precipe la junuloj, forto kaj espero de la mondo, devas ludi sian rolon por konstrui la mondon.



F-ino Sabira (la dua de dekstre) en EPC-redakcio. La unua de dekstre estas la aŭtoro.

## SAGĜECO KAJ ENTUZIASMO

Sabira estas inda je la nomo granda konanto de Ĉinio. Anstataŭ per taksio, ŝi veturis per aŭtobuso aŭ metroo kune kun mi. Ŝi sola venis al la templo Fayuan (Fajŭan) kaj la templo Yonghe (Jonghe) por percepti la tradician ĉinan kulturon. Ŝi aĉetis memoraĵojn por siaj amikoj kaj parencoj en magazenoj ĉe la komercaj stratoj Wangfujing (Ŭangfuĝing) kaj Qianmen (Ĉjanmen), sed ne faris tion en vendejoj speciale por fremdlandanoj. Ŝiaj amikoj diris al ŝi kun ŝerco: "En Ĉinio, se vi diros, ke vi estas uĝuro de la Xinjiang (Ŝingĝang)-a Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, oni tion kredos." Fraŭlino Sabira respondis fiere en la ĉina lingvo: "Mi povas esti kalkulata ankaŭ kiel tataro de Xinjiang, ĉar mia patro estas tatardevena."

Itutage mi akompanis ŝin dum ŝia aĉetado. En la Qianmen-a Vendejo de Ŝilkaĵoj ŝi aĉetis 5 metrojn da silko por pentri bildojn sur ĝi. Ŝi diris, ke ŝiaj pentraĵoj estas same belaj kiel iuj vendataj en butikoj. Poste, ŝi elektis vakse tinkturitajn ŝtofojn kun desegnoj de floroj kaj purpura fono por sia fratino, bluan

ŝtofon kun blankaj desegnoj por sia patrino, kaj kvadratan tukon kun portreto de mjaŭ-nacia junulo por la prezidanto de TEJO. En la Nacia Librejo ŝi aĉetis dekkelkajn historiajn librojn kaj vortarojn en la uĝura kaj mongola lingvoj.

La 13-an de novembro, okazis amuza vespero organizita de la Pekina Junulara Federacio. Sabira aranĝis la programeron Sankta Luĉia. Ŝi rakontis al mi la legendon cirkulantan en norda Eŭropo: Antaŭvespere de la Kristnasko, Sankta Luĉia, portante sur si blankan robon, kun ruĝa zono ĉe la talio kaj brulanta kandelo en la mano, transiras stratojn kaj kantas por beni ĉiujn homojn. La blanka koloro simbolas purecon kaj la ruĝa entuziasmon. Sabira preparis rekviziton kaj verkis Esperantajn kantvortojn. Ŝi petis min ludi la rolon de Sankta Luĉia. Kun la haroj pendantaj ĝis la ŝultroj kaj bela paperkrono sur la kapo, portante mantelon el blanka tablotuko kaj tenante kandelon en la mano, mi suriris sur la scenejon kaj kantis "Sankta Luĉia, bril' de arĝento, kun la rideto, Dio benata..." Kvin nordeŭropaj junuloj en samaj kostumoj sekvis min kaj akom-

pane kantis en la sveda lingvo. Niaj ses kandeloj prilumis la halon, kaj aŭdiĝis varma aplaŭdado.

Fraŭlino Sabira montris sian saĝecon kaj entuziasmon en ĉiuj okazoj. Ŝi eble estis la plej juna el la reprezentantoj de la kunveno. Ŝi estis altastatura, kun la okuloj brilantaj kaj mallonga harplektaĵo sur la kapo, kaj la ruĝa harornamaĵo en formo de papilio tremetis kun ŝia ridado.

## ADIAŬO

La konsulto finiĝis post intensa diskutado. Mi devis diri adiaŭ al Sabira, mia nova amikino.

Vespere de la 15-a de novembro, la reprezentantoj kun malsamkoloraj haŭtoj de malsamaj nacioj venis al la kafejo de la hotelo por adiaŭi unu alian. Sabira portis sur si nigran plisitan jupeton kaj rozkoloran superveston, kaj tio klare evidentigis ŝian blankan haŭtkoloron. Mi admiris: "Sabira, ĉi-vespere vi aspektas pli bela!"

Sabira adiaŭis la organizanton de la Ĉina Junulara Federacio. Ŝi dankis la ĉinajn gastigantojn pro ilia bona servo. Poste, ŝi menciis Esperanton kaj esprimis sian deziron starigi en Ĉinio junularan Esperantan organizaĵon, kaj pro tio ŝi petis helpon de koncernaj flankoj de Ĉinio. Vicgeneralasekretario Cai Wu (Caj U) de la federacio montris sian simpatiecon al la afero kaj donis proponojn pri nia preparo. Aŭdinte tion, Sabira diris kun ĝojo: "Grandan sukceson al via laboro!"

Oni faris foton por Sabira kaj mi: mi sidas sur ŝiaj genuoj, kun la kapo al la ŝia. Ĉe la adiaŭo Sabira brakumis min kaj flustris ĉe mia orelo: "Mi tre dankas vin, mi tre kontentas pri ĉiuj minutoj pasigitaj kune kun vi. Ĝis la venonta jaro!" Mi kapjese diris: "En la venonta jaro bonvenigos vin ne nur mi, sed ankaŭ multaj aliaj junaj esperantistoj de Ĉinio." ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Korespondo-petojn precipe de Azio kun japanoj, konstante akceptas Japana Esperanto-Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

\* Aleksandr, 35-j., dez. kor. kun esperantistoj el Ĉinio, Japanio, Hindio, Aŭstralio kaj Indonezio, interesiĝas pri turismo, kolektas librojn kaj insignojn. Adr.: 324056 Ukraine, Krivoy Rog 56, Solnechniy 3-105, Lukyanenko.

\* Grant Stott dez. kor. kun tutmondaj geamikoj de kiaj ajn aĝoj pri diversaj temoj, interesiĝas pri arto, muziko, fotografio, komputilo. Adr.: Box 15659, Auckland, Novzelando.

\* Skribu al mi en ĉiu ajn temo, mi kolektas bankbiletojn kaj poŝtkartojn. Mia adreso estas: Juho Ilmari Vattulainen, 81160 Romppala, Rantakylantie 64, (Finland) Suomi.

\* Sicoie Claudia Ioana, 18-j. fraŭlino, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Adr.: Str. Republicii, Bl. 9, Sc. I, Et. IV, Ap 46, Lec, Brad, Jud. Hunedoara, Lod. 2775, Rumanio.

\* Kim Tae Geng, 25-j. studento, dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, interesiĝas pri ĉinaj lingvo kaj literaturo. Adr.: 358-59, Biesan 6-dong, Taegu, R.O.Korea.

\* Sun Mingxiao, 28-j., deziras ko-

respondi kun tutmondaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Wenhua Lu 64 Hao, Zaozhuang CH-277136, Shandong, Ĉinio.

\* Geknaboj, 10-13-j., dez. kor. kun alilandaj geknaboj. Adr.: Geknaba E-kurso, la Geknaba Domo de Jianggan-distrikto, 6 Nanxingjia'r Xiang, Hangzhou 310008, Zhejiang, Ĉinio.

\* Ĉe ni estas multaj favoraj politikoj por ke eksterlandanoj investu en nia loko. Ni bonvenigas eksterlandanojn vojaĝi kaj investi en nia loko. Vi ricevos koncernen informon kaj helpon senpage, se vi skribos al: Tan Dehong, Nongmu Jiaoyuzu, Songzi, Hubei, Ĉinio.

\* Liu Yanfeng, 25-j., ŝatas kolektadon, filatelon, fotografadon k.a., dez. kor. kun e-organizoj kaj Espistoj por kune esplori disvolviĝon de Esp. kaj kolekti historiajn materialojn pri diverslandaj E-movadoj. Adr.: Yingfeng Dong-Lu 10 hao, Huaihua 418000, Hunan, Ĉinio.

\* Nia kurso havas 40 membrojn, kiuj havas 9-12 jarojn. Ĉiu el ili volas korespondi kun gelernantoj de Esperanto el diversaj landoj. Sendu al ilia instruisto Zheng Yuehua, Di Yi Xiao Xue, Changji Zhou, Xinjiang, Ĉinio.

\* Mi volas fondi kompanion aŭ fabrikon en orientaj eŭropaj landoj. Ni esperas ke esperantistoj aŭ Esp-organizoj en Eŭropo povos helpi nin kiel nia peranto por registri en koncernaj departementoj. Nia registrmono povas esti 10 000-100 000 USD. Bonvolu kontakti kun Song Zibin. Adr.: 83 Sheng Li Lu, Bengbu, 233000 Anhui, Ĉinio.

\* Li Yamin, ĉinstila pentristo, dez. kor. kun diverslandaj geamikoj. Adr.: Xierdaojie, No. 17-1, Chang-

gengwei 109 Zu, Qiqihar 161006, Heilongjiang, Ĉinio.

\* Esperanto Klubo de mezlernejo en centro de Francio dez. kontaktiĝi kun sama klubo el suda Germanio (Bavario). E-Klubo-Mezlernejo, Condorcet 63290 Puy, Guillaume, Francio.

\* Karlheinz Groh, 41-j. kriplulo, intelektulo, deziras korespondi kun ĉinaj kaj alilandaj geesperantistoj. Erlenbag 8, W-6229 Schlangenbad-Georgenborn, Germanio.

\* Ceslovas Trucionis, 55-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Kolektas Esperantaĵojn. Adr.: Smetonos 1-17, 5300 Panevejis, Litovio.

A Zoltan Vaš, 30-j. profesoro, bildkartkolektanto, dez. kor. tm. Adr.: Partizanska 5, 24321 Mali Idjoš, Jugoslavio.

\* Nina Zujeva, 48-j. inĝenierino, volas gastigi ĉinajn esperantistojn, konigi urbon, rusajn tradiciajn ritojn kaj ekskursoj garantiataj. Adr.: ul. Koroljova, 7, kv. 71, 399740, Elec, Lipeckaja obl., Ruslando.

\* Moivosi Loraivo, 40-j., dez. kor. kun ĉinaj samideanoj. Adr.: Oradea, str. Magherv Nr 2, Rumanio.

\* Rajendra Man Shreslha dez. kor. tm. interesiĝas pri bildkartoj, fotografado kaj pentrado. Adr.: 503 Maju, Pyaphal Jole, Kathmandu-14, Nepal.

\* Mi, 37-j. instruistino de la angla lingvo, kaj mia 7-j. filo interesiĝas pri historio, kulturo, arto, religioj, kino, fremdaj lingvoj, turismo kaj kolektas pm., bk., modeloj de mini-aŭtoj, pupoj ktp. Adr.: Helen Avdick, Pr. 40 let Pobedy 70-72, Grodno, Belruso.

(Datrigo de p. 13)

fridujoj kaj komencis produktadon. La Xiaolan(Ŝjaŭlan)-a Ŝaltila Fabriko ankoraŭ produktas elektraĵajn ventumilojn. Kial? Ĉar ili havas debiton sur merkato.

Ekonomikisto Wu Jinglian (U Ĝingljan) montris, ke en Ĉinio kune ekzistas du specoj da ekonomiaj fortoj, unu estas tre viglaj ekonomiaj fortoj neŝtataj, kiuj kreskis ĉefe en reformado de merkato, kaj la alia estas plejparto de la ŝtataj entrepre-

noj, malprosperaj kaj malprofitaj. La komparo montris, ke oni devas rapide starigi novan sistemon de merkata ekonomio por meti solidan bazon al la leviĝo de ekonomio.

El tio oni vidas, ke ankaŭ socialismo havas sian merkaton kaj kapitalismo sian planon. Ekzemple, Japanio kaj Germanio post la Dua Mondmilito disvolvis sian ekonomion en alta rapideco, prenante la planizitan ekonomion kiel la rimedon. Vizaĝe al la faktoj, ĉinoj iom post iom komprenis, ke plano kaj

merkato ne estas kriterio por diferencigi socialismon disde kapitalismo, sed nur ekonomiaj rimedoj. Tial la merkata ekonomio ne neprigas kapitalismon. Praktiki la merkatan ekonomion absolute ne signifas radikale reformi posedsistemon, aŭ alivorte, praktiki privatan posedsistemon. Ĉinio prenas merkatan ekonomion kiel rimedon nur por enkonduki sciencan metodon apartenantan al la homaro, kun unusola celo starigi socialisman merkatan ekonomion kaj prosperigi Ĉinion. ■



## ESP-NOVAĴOJ

● Por festi la 133-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la Pekina E-Asocio okazigis en la 13-a de decembro 1992 kunsidon pri Tokuda Rokuro kaj pekinaj e-istoj. S-ro Tokuda Rokuro, pli-ol-80-jara, estas fama japana e-isto. Li multjare klopodis por ofta kontaktiĝo inter Ĉinio kaj Japanio. En 1992 li donacis monon al la Pekina E-Asocio.

● De la 15-a ĝis la 17-a de decembro 1992, la 3-a Kongreso kaj Simpozio de la Guangxi-a E-Asocio okazis en la bela urbo Guilin. Ilia ĉefa enhavo estis fari laborraporton; revizii la statuton; voĉlegi disertaciojn kaj aljuĝi premiojn por ili; interŝanĝi informojn pri E-movado; kaj festi la 133-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. En la kongreso elektigis nova konsilantaro. Pli ol 40 e-istoj venintaj el diversaj lokoj de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono ĉeestis la kongreson.

● De la 14-a ĝis la 16-a de decembro 1992, la 4-a Esperanto-Kongreso de Liaoning-provinco okazis en la urbo Dandong. Krom resumi laboron, interŝanĝi spertojn, honori avangardulojn kaj elekti novan konsilantaron, oni ankaŭ diskutis, ke E-aj organizoj devas fondi ekonomian enton. 56 delegitoj ĉeestis la kongreson.

● Komence de decembro 1992, finnlanda e-isto Jorma Ahomäki venis en Pekinon por turisma vojaĝo. Dum sia restado en Pekino li vizitis la redakcion de EPĈ, la E-an sekcion de Ra-

dio Pekino kaj la Pekinan E-Asocion. S-ro Jorma Ahomäki estis membro de LKK de la 54-a UK en Helsinki. Dum multaj jaroj li prezidis la E-societon en Turku kaj gvidis multe da kursoj por plenaĝuloj kaj lernejoj.

● Respektive en la 20-a kaj la 26-a de novembro 1992 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis memorigajn poŝtmarkoseriojn "Modernaj ĉinaj sciencistoj" kaj "La 90-a datreveno de la naskiĝo de Luo Ronghuan". Pro tio la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio uzis E-ajn memorstampojn. Okaze de la 4-a Ĉina Tongrun-pokala Konkurso de Vejĉi-reĝo en Changshu, la Poŝtmarka Kompanio de la urbo emisiis memorkoverton kun E-a stampo. La projektinto de la supre menciitaj stampoj estis Zhang Linrui.

● Estas planata ekspedicio tra la Okcidenta Tianshan-montaro somere de 1993. Naturamikoj bonvolu kontakti: Eugeno Davkaev, Box 597, Rus-197061 St. Peterburgo, Rusio.

● Kongreso de la Internacia Ligo de Kuracistoj por la Abolicio de la Vivisekcio okazis de la 10-a de oktobro 1992 en la urbo-domo de Zuriko en Svislando. La kongreson partoprenis medicinistoj, profesoroj, kuracistoj, lingvistoj, tradukistoj, doktoroj, inĝenieroj kaj aliaj fakuloj kaj studentoj pri sano kaj medicino venintaj el diversaj landoj de Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo kaj Aŭstralazio. Niĝeria e-isto prof. Godwin prelegis pri la abolicio de la vivisekcio kaj animalaj

eksperimentoj de kosmetikaĵoj tra la mondo.

● Por la 9-a datreveno de sia fondiĝo, la Niĝeria Esperanto Solar-Asocio okazigis Semajnon de Esperanto de la 1-a ĝis la 6-a de oktobro 1992 en Lagos de Niĝerio.

● Nepala Esperanto-Asocio, kiu revigliĝis antaŭ 2 jaroj, nun eldonas revuon "MONTEJO" kvarfoje jare. MONTEJO enhavas jenajn rubrikojn: "Raporto", "Redaktante", "Intervjuo", "Traduko", "Leteroj" ktp. S-ro Dipendra Kumar Piya estas ĉefredaktoro de MONTEJO. La adreso de la redakcio estas: Montejo, Nepala Esperanto-Asocio, P.O. Box. 4098, Kathmandu, Nepal.

● La Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo (Francio) disponas preskaŭ tuttempe uzeblan ejon, kaj proponas al siaj membroj diversajn manierojn por lerni, praktiki kaj disvastigi la internacian lingvon. La 10-an de oktobro 1992 kvindekda esperantistoj el diversaj urboj manifestaciis antaŭ la sidejoj de televidstacio France-3 kaj ĵurnalo "La Dépêche du Midi". EKC lanĉis cirkuleron por manifestacii respondante al la alvoko de la Verdula Esperanto-Asocio. La manifestacio celis malfermi publikan debaton pri la problemoj de komunikado kaj la lingvoj en la baldaŭa Grand-Eŭropo kaj prezenti Esperanton kiel ĝustan solvon por ĉiuj. Ĝia rezulto estis sufiĉe pozitiva. Por pliaj informoj pri la Esperanto-agado en Tuluzo, turnu vin al: Esperanto-Kultur-Centro 1, rue Jean-Aillet, F-31000 Toulouse, Francio.

S-ro Jorma Ahomäki (maldekstre) en la redakcio de EPĈ



Francaj esperantistoj en la manifestacio





La aŭtoro kaj s-ro Bruno Vogelmann (dekstre)

**A**NTAŬ nelonge mi ricevis ĵus eldonitan Esperantan verkon de Germanio, kun subskribo de la aŭtoro, kiu mem sendis la libron al mi. Li estas s-ro Bruno Vogelmann, 84-jara esperantisto kaj honora membro de UEA. Nia amikeco komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj.

Iun tagon de la frua aŭtuno de 1984 mi kune kun tri samideanoj de la E-instituto de Lanzhou (Langŝou), la ĉefurbo de Gansu-provinco, iris al la hotelo "Amikeco" por viziti germanan esperantistan grupon estratan de s-ro Bruno Vogelmann. Je la unua renkontiĝo ni interparolis kiel malnovaj amikoj. Li miris, ke mi parolas nian lingvon flue, kaj demandis min, kie mi ĝin lernis. Informiĝinte, ke mi ĵus finis mian studon de Esperanto en la Pekina Fremdlingva Instituto, li ĝoje diris: "Mirinde, en nordokcidenta Ĉinio troviĝas tiom da bonaj esperantistoj." Akompanate de ni, la germanaj amikoj rigardis la postpluvan Lanzhou. Ili ne ŝparis laŭdvortojn al ĝiaj puraj stratoj kaj freŝa aero. S-ro Vogelmann diris al mi, ke Lanzhou donis al li tiel bonan impreson, ke li volas duafoje viziti ĝin. Li deziris korespondi kun mi, kaj ni faris interkonsenton, ke ni revidiĝos en la 71-a UK. De tiam iompostioje profundigis la amikeco inter mi kaj s-ro Vogelmann, kiu estas pli aĝa ol mi je 40-kelkaj jaroj.

Nia korespondo daŭris jam 9 jarojn. Komence mi nomis lin "estimata s-ro Vogelmann", sed li skribis al mi: "Ni estas amikoj, do estas bone, ke vi nomu min 'amiko' por intimeco." Poste mi nomas lin "kara amiko". Li konigis al mi sian duan filon Dieter Vogelmann, kiu laboras kiel aŭtomatika inĝeniero en Hamburg kaj fariĝis mia alia germana korespond-amiko. Li bone posedas nian lingvon, kaj en 1985 mi ekkorespondis kun li. Mi rekomendis EPĈ al li, kaj li abonis ĝin por unu jaro. Li skribis al mi: "Mi bone lernis Esperanton de mia patro en mia knabeco. Sed en la lastaj jaroj mi ne kontaktiĝis kun samideanoj. La vojaĝo de mia patro en Ĉinio kaj via sincera amikeco vekis mian fervoron." Vere, li de tiam estas aktiva en Esperanto-movado.

En 1986 mi partoprenis la 71-an UK en Pekino.

ZHANG FUDE:

## Nin amikigis Esperanto

Bedaŭrinde, en la kongreso mi ne vidis s-ron Bruno Vogelmann, kiu forlasis la vojaĝon pro io. Lia filo salutis min en lia nomo. Mi petis lin transdoni mian bondeziron al lia patro. El la memoraĵoj donacitaj de s-ro Vogelmann al mi, plej plaĉas al mi delikata globkrajono kun liaj nomo kaj adreso.

S-ro Vogelmann scias, ke mi okupiĝas pri aŭdovida instruado. Li subtenas, ke mi aplikas Esperanton en mia laboro. Li mempage abonis por mi Esperantajn gazetojn pri mia fako kaj ofte sendis al mi novajn fakajn materialojn. Dank' al lia helpo mi ekkonis internaciajn informojn pri mia fako, kaj tio multe akcelis mian laboron.

Krom esprimi dankon, mi ankaŭ montris maltrankvilon en miaj leteroj, ĉar mi ne povis rekompeni lin pro tiel granda helpo. Li diris, ke li bone scias, ke lerni Esperanton estas multe pli malfacile por ĉinoj ol por eŭropanoj. Li tre ĝojas havi diligentan ĉinan esperantistan amikon kiel mi. Li diris: "Se ni laboras por bona afero, por paco, por helpo al la tria mondo, por mediprotekto aŭ por la Internacia Lingvo, kaj se ni volas dediĉi multan tempon, multan energion kaj eble monon, eble rezignon je ĝuo pro tiu bona afero, ni neniam devas pensi, ke iutage ni ricevos rekompencan, eĉ agnoskon, laŭdon aŭ famon. Nia rekompenco estas la konscio, ke ni laboris por bona afero."

Somere de 1989 trafika akcidento trafis s-ron Vogelmann, kiu ĵus festis la 80-an datrevenon de sia naskiĝo, kaj lian edzinon. Ili ambaŭ enhospitaliĝis. Sed la maljunulo mirinde resaniĝis post du monatoj. Elhospitaliĝinte, li plurfoje skribis al mi, ke mi daŭrigu korespondon kun s-ro Dieter. En sia letero li diris, ke li esperas duafoje viziti Ĉinion, sed lia nebona sanstato povas elrevigi lian deziron. Eble lian Esperantan aferon daŭrigos lia filo energia kaj kompetenta. Tiuj vortoj montris, kiel kara la germana maljunulo rigardas nian amikecon.

Dank' al la helpo de s-ro Vogelmann mi multe altigis mian lingvan nivelon kaj plibonigis mian fakan laboron. Nia kontaktiĝo riĉigis mian spiritan vivon. Esperanto estas ne nur komunikilo, sed ankaŭ ponto de amikeco.

Je la fino de la artikolo mi tutkore deziras sanon kaj longan vivon al mia fora amiko. ■

**K**UN la kreskanta poluciado de la medio sur la tero, leviĝas en la mondo verda revolucio. De la lastaj jaroj sur merkato aperas diversaj verdaj manĝaĵoj kaj produktaĵoj. La evoluintaj landoj faras grandan penadon por ekspluati novajn produktaĵojn, kaj la verdaj ekologiaj produktaĵoj furoras en la 90-aj jaroj.

Dum miloj da jaroj la homoj forĵetis eluzitaĵojn tute ne konsiderante aŭ malmulte konsiderante, ĉu la tero, la lulilo de la homa vivo, elportos tion aŭ ne. Se oni ne bridas tion, la tero fariĝos granda rubejo en la proksima estonteco.

En la komenco de la 70-aj jaroj la homaro fiere deklaris, ke la mondo jam enpaŝis en la epokon de plastaĵo, kiu kaŭzis revolucion al la tradiciaj materialoj kaj uziĝas preskaŭ en ĉiuj kampoj. Sed samtempe ĝi serioze poluciis la medion, kion oni ne atendis. Ĝenerale, la plastaĵo ne putriĝos en tero eĉ post unu jarcento. Ĉiutage, produktiĝas miloj kaj dekmiloj da tunoj da plastaĵoj, kiujn la tero neniel povas "digesti". Tial post la plastaĵa epoko nepre venos la epoko de plastaĵa polucio. La problemo estas atentata de la socio kaj sciencistoj. En la 70-aj jaroj sciencistoj de Usono kaj aliaj landoj inventis specon de plastaĵo malkomponeblan en mallonga tempo. En la 80-aj jaroj oni uzis ĝin kiel materialon por fari pakumon kaj ujon, kaj plie, por fari membranon uzatan en kulturado de legomoj. Oni nomas ĝin verda plastaĵo aŭ ekologia plastaĵo. Eble de tio komenciĝis la verda revolucio.

SHI MING:

## Verda revolucio leviĝanta

El plasta pakado formiĝas serioza fonto de polucio. Nun plastaj sakoj kaj ladskatoloj uziĝas ĉie en la mondo. Por ŝpari riĉfontojn kaj protekti la medion, multaj landoj faras ĉion eblan por krei senpolucian pakmaterialon. En Germanio oni faris amelan tason nesolveblan. Ĝi estas uzata por enteni lakton. Dank' al tio, ĉiujare Germanio ŝparas grandegan kvanton da plasto. En Britio oni uzas plastan sakon el amelo kaj artefarita fibro, kiuj povas malkomponiĝi en akvon kaj karbonan dioksidon. Multaj kompanioj de Japanio uzas senpolucian papersakon aŭ kotonan tukon por paki varojn.

La homoj multe zorgas pri la polucio de manĝaĵoj. En 1972, en Germanio fondiĝis la Federacio de Organika Agrikulturo. Ĝi kontrolas kaj organizas la produktadon de senpoluciaj organikaj manĝaĵoj — verdaj manĝaĵoj. Ĝis 1990 la federacio jam akceptis pli ol 300 membrojn-organizojn, kiuj funkciis en pli ol 60 landoj kaj regionoj, kun 16 400 entreprenoj. La verda revolucio okazis ankaŭ en agrikulturo kaj manĝaj-prilaborado en Ĉinio. Februare de 1990, la Agrikultura Ministerio de Ĉinio jam donis titolon de verda manĝaĵo al 128 specoj da manĝaĵoj.

La revolucio envolvas ne nur

agrikulturon, sed ankaŭ industrion kaj komercon. Rimarkindas, ke en nemalmultaj landoj aparte furoras verdaj produktaĵoj.

En Japanio oni donas senpoluciajn donacojn de verda ekologio, anstataŭ belaj kaj luksoj.

En la Monda Konferenco pri Protektado de la Medio la Franca Buroo de la Tabaka kaj Alumeta Industrio proponis alumeton de

verda ekologio, kiu ne entenas malutilajn substancojn, kiaj kromo, sulfuro kaj zinko, kaj kies substanco estas malkomponebla. La skatolo estas reutiligebla.

En Brazilo oni produktas novfasonajn vestojn de verda ekologio kun desegnoj de primitiva arbaro kaj maraj estaĵoj, kaj ankaŭ krudan tolon kaj ornamon el jutaj ŝnuretoj.

La fama Aŭta Kompanio "Bench" de Germanio produktas la aŭton de verda ekologio. La aŭtofabrikanto diris, ke ĉiuj partoj de la aŭto reutiligeblas.

La sveda paper-industria kompanio produktas paperajn vindotukojn blankigitajn ne per kloro. En Japanio iam furoris ludiloj movataj de risorto, lignaj ludiloj k.s.

Multaj registaroj kuraĝigas utiligadon de verdaj produktaĵoj. Ili praktikas la sistemon de verda marko. Kompanioj kaj fabrikoj de iuj landoj konkure engaĝas ekologiajn direktorojn kaj konsilantojn.

La verda revolucio ŝanĝas la koncepton de la nuntempa konsumado kaj konsiderigas pri la serioza media polucio. La revolucio leviĝas kun la progreso de la socio kaj havos belan estontecon. ■

# Sporto de bravuloj

**K**VANKAM glittabula ludo estas populara en multaj lokoj de la mondo, tamen en Pekino, nur de la lastaj du jaroj ĝi furoras inter knaboj.

En okcidenta Pekino, en Gongzhufen (Gonggufen), troviĝas promenejo. En ĝia orienta parto estas cementa trotuaro longa je 100 m kaj larĝa je 20 m. Kutime posttagmeze aŭ en festotago, tie estas multaj ludantoj de glittabulo kaj entuziasmaj spektantoj. Tial, la loko estas konata kiel la centro de glittabula ludo de Pekino.

La ludo originis en Usono. Komence oni fiksis radojn sur surfotabulo kaj ludis ĝin por sperti ĝojon de la ludo kvazaŭ sur ondoj. Poste, ĝi fariĝis nova sportbranĉo. En la pasintaj dek jaroj, en Ĉinio glittabula ludo vidiĝis nur en televido aŭ raportigis en gazetoj. La usona filmo "Unuaranga Risko", projekciita en Ĉinio, per riskaj movoj de glittabula ludo vekis fortan intereson ĉe multaj knaboj. Unu el ili estis Wang Lei (Ŭang Lej), kiu lernas nun en la Pekina Politekniko.

Mezstatura Wang estas parolema kaj tre interesiĝas pri tia ludo. Li diris, ke li unufoje vidis glittabulan ludon en televido, kiam li lernis en mezlernejo. Lin forte emociis la mirinda ludo. Tamen nenie en Pekino li povis aĉeti glitta-

bulon. Li do faris simplan glittabulon el ligna plato, lagro kaj subtenilo.

Por ĉinaj knaboj, estas ne facile ludi glittabulon lerte sub la nunaj kondiĉoj. Ĉar ĝis nun neniu fremdlanda profesia trejnisto venis al Ĉinio por instrui la ludarton. Ĝin oni lernas nur per televido aŭ filmo. En la ludejo de Gongzhufen junulo Zuo Fei ludas plej lerte. Li kapablas transsalti duonmetre altan barajon. Wang Lei posedas multajn artojn de la ludo. Li kapablas permane stari sur glittabulo kaj piede teni ĝin starigita. Dum glitado li povas suprensalti, turnante la tabulon du fojojn, kaj fali sur ĝin antaŭ ol gliti pluen. La menciitajn movojn ili pene ellernis pere de vidbendo. La ludo de glittabulo karakteriziĝas per rapideco kaj varieco, kio allogas spektantojn. Sed tio malfaciligas la lernadon de Zuo Fei, Wang Lei kaj aliaj amatoroj. Por lerni la arton ili devas malrapidigi la turniĝadon de la bendo kaj imiti la movojn fojrefoje. Ĝuste el tio venis la sukceso de Wang Lei. Kaj ankaŭ Zuo Fei rapide progresis kaj povas fari tian transsalton.

La centroj de glittabula ludo, kia Gongzhufen, formiĝis spontanee. Tamen la Pekina Xiangyun(Ŝjangjun)-a Teamo de Glittabula Ludo, fondita en majo de 1992, estas el profesiaj sportistoj. En 1990, post la 11-a

Azia Sportkunveno en Pekino, la Pekina Sporta Instituto enkondukis glittabulan ludon kiel novan internacian sportbranĉon kaj fondis grupon el 18 membroj elektitaj el la 70 dezirantoj. Ili lernis de alilandaj studentoj, kiuj lernis en Ĉinio kaj scipovis ludi glittabulon, kaj konsultis koncernajn materialojn. En 1992 kelkaj membroj de la grupo estis diplomitaj. Xiangyun-kompanio, kiu faras kaj vendas ekskluzive glittabulojn, engaĝis ilin kaj ilian trejniston Zhou Wei (Ĝou Ŭej) kaj fondis la teamon. En la ludejo de Gongzhufen ludantoj prenas ŝtonojn kiel barajon. Tamen, la ludejo de la teamo estas ekipita per U-forma baseno, triangula deklivo, granda oblikva tabulo kaj turo. Tie trejnatas lertaj glittabulaj ludantoj Hu Bing kaj Zuo Fei. Wang Lei esprimis sian deziron esti trejnisto de la teamo post sia diplomigo. Ĉeftrejnistoj kaj direktoro Zhou Wei diris, ke ili malfermos la centron al amatoroj por pli rapide popularigi la sporton en Pekino.

Kial glittabula ludo tiel ravas junulojn? La juna trejnisto Hu Bing diris: "Per riskeco, lerteco kaj rapideco glittabula ludo vidigas la kuraĝon de junuloj por defii la vivon kaj la spiriton timi nenian malsukceson. Kompreneble, ĝin ŝatas junuloj." ■



Prezentado

Interșanđo de ludartoj



# Inventinto de hibridigita rizo

**E**N la frua periodo de la 70-aj jaroj, ĉina rizkultura fakulo Yuan Longping (Jūan Longping) sukcese elkulturis hibridigitan rizon kaj trovis novan vojon por multe altigi la produktokvanton de greno. Pro tio, li estis titolita “inventinto de hibridigita rizo”.

Frue en la 30-aj jaroj, multaj sciencistoj en la mondo provis hibridigi rizon, tamen ili ĉiuj malsukcesis en tio. Tial, estis preskaŭ tute konfirmite, ke pri hibridigo ne estas supereco por la rizo polenita de sia floro. Tamen, Yuan Longping, diplomito el la Xibei (Ŝjibej)-a Agronomia Instituto de Ĉinio, sentime defiis la konfirmon. En 1964, iutage, li hazarde trovis sur kampo strangan rizplanton kun granda spiko, kaj transplantis ĝin sur sian eksperimentan kampon. En la sekva jaro la rizplantaĵoj, elkulturitaj de li per la semoj, ne kreskis egale, nek prospere. En malespero li pensis, ke eble tion kaŭzis la disiĝo de la dua generacio de nature hibridigita rizo. Tio edifis lin kaj venis al li en la kapon la ideo “rizo havas superecon en hibridigo”. De tiam li faris sisteman kaj peneman esploron tiurilate.

Por utiligi la superecon de rizo en hibridigo, oni devas elkulturi la patrinrizon kun sta-

menaj floroj sterilaj, t.e., sterila linio kaj konserva linio, kiu polenas sterilan linion por ties generado kaj konservado de sterileco ĉe la rizido; ankaŭ por transformi la sterilan linion en la virseksan rizon, kiu spikiĝas kaj havas grandan superecon kiel kutime, nome, restaŭra linio de maskla sterileco. Nemankigeblaj estas la tri linioj. Yuan Longping decidis unue esplori la masklan sterilecon. Por trovi rizplanton de maskla sterileco, li kaj lia edzino malfacile serĉadis sur rizkampoj preskaŭ ĉiutage. Du jarojn poste, li finfine trovis 7-8 tiajn plantojn. En aliaj ses jaroj li faris pli ol 3 000 grupetojn el 1 000 specioj da rizo. Tamen ankoraŭ ne sukcesis lia provado. Li daŭre okupiĝis pri sia esplorado.

En 1970 post longdistanca veturado li venis al Hainan-insulo kaj sukcesis en sia esplorado. Iun tagon de novembro, lia helpanto Li Bihu trovis strangan sovaĝan rizplanton en marĉo de la plej suda parto de la insulo. Ĝuste ĝi estis la sovaĝa rizplanto de maskla sterileco, soifata de Yuan Longping. Sinsekvajn tagojn li kaj liaj helpantoj flegis kaj polenis ĝin, kaj finfine li akiris rajajn semojn. Dank’ al tiuj semoj, li malfermis vojon por la kompletigo de tri linioj kaj akiris speciojn de la sterila kaj konserva linioj. Post unu jaro li trovis la



S-ro Yuan Longping

specion de la restaŭra linio el la altproduktaj semoj de sudorienta Azio. Tiel li eniris en la lastan periodon de sia esploro. Por rapide sukcesigi la esploron li faris eksperimenton printempe en norda Ĉinio, aŭtune kaj vintre en suda Ĉinio, kaj per sepgeneracia semokulturado en du jaroj anstataŭigis unugeneracian en jaro. Li eĉ ĝermigis semojn en vagonaro, ŝipo kaj aeroplano dum vojaĝo.

Post dekelkaj jaroj li riĉe rikoltis la rizon elkulturitan per granda penado. En 1973 li elkulturis la specion de la trilinea kompletigo. En 1974 li elkulturis hibridigitan grupon kun forta supereco. De 1976 ĝis nun tia hibridigita rizo estis kulturita sur kampoj kun areo de 1.43 miliardoj da muoj (15 muoj = 1 hektaro) kaj la produktokvanto pliiĝis je 120 miliardoj da kilogramoj. Kaj la pomua produktokvanto de la hibridigita rizo pliiĝis je 85 kg, kompare kun tiu de la nehibridigita.

Yuan Longping solvis malfacilan problemon nesolvitan de la antaŭuloj. Lia sukceso vekis la



S-ro Yuan Longping (meze) kaj liaj helpantoj sur rizkampo

atenton de la mondo. En 1981, kiam li ĉeestis la internacian konferencon pri rizo, sur la ekrano en la kunveno aperis la vortoj "ĉina inventinto de hibridigita rizo" kaj lia portreto. Tiam la alilandaj sciencistoj stariĝis kaj aplaŭdadis lin. En septembro 1987, en la internacia simpozio pri rizo okazinta en Hangzhou (Hangĝoŭ) de Ĉinio, la estro de la Internacia Instituto pri Rizo laŭdis, ke Yuan Longping malfermis novan eraon por kulturi semojn de rizo kaj altigi ĝian produktokvanton. Agronomoj de multaj landoj venis en Ĉinion por lerni kiel hibridigi rizon. Samtempe kun tio, Ĉinio sendis grandan nombron da agronomoj al aliaj landoj por doni helpon. En la esplorado pri hibridigo de rizo Ĉinio starigis rilaton kun pli ol 20 landoj kaj regionoj. En 1980 Ĉinio transigis la teknikon de hibridigo de rizo al Usono kaj laŭ peto de Usono sendis siajn fakulojn instrui teknikon por havigi al Usono novan kombinaĵon de hibridigita rizo laŭ ĝiaj postuloj. La produktokvanto de la specio estis je 49% pli granda ol tiu de la loka rizo. Ankaŭ en aliaj landoj la hibridigita rizo donis altan produkton. En Japanio la produktokvanto de la hibridigita

rizo estis je 22% pli alta ol tiu de la loka rizo. En Argentino je 55%-78% pli alta ol tiu de la loka rizo. En Hindio, Meksikio, Malajzio, Hispanio, Italio, Portugalio, Niĝerio, Egiptio k.a. rimarkinde kreskis la produktokvanto de la hibridigita rizo.

Sukcesinte en esplorado pri la kompletigo de tri linioj, Yuan Longping prezentis novan projekton: de utiligo de la supereco en tri linioj al tiu en du linioj,

kaj plue al tiu en unu linio, por ke la kulturado de semoj estu pli simpla; la produktokvanto — pli granda; kaj la kvalito de rizo — pli bona. La projekto estas listigita kiel unu el la planoj de la ĉinaj altaj teknikoj kaj estas prenita kiel ŝlosila studobjekto de la tuta lando. La esplorado de du linioj estas disvastigita. En 1990, utiligante la superecon de la hibridigita rizo, sciencistoj kulturis 2 000 000 muojn da rizo kaj la pomua produktokvanto estis je 15%-20% pli alta ol tiu de tri linioj kaj je 40% pli alta ol tiu de la ordinara rizo. Laŭ takso, je la fino de la kuranta jarcento, oni plantos tian hibridigitan rizon sur 200 milionoj da muoj da kampoj kaj ĉiujare pliiĝos ĉ. 27 miliardoj da kilogramoj da greno.

60-jara Yuan Longping funkcias kiel estro de la Esplora Centro pri la Hibridigo de Rizo de Hunan-provinco. Por akiri pli da sukceso li dediĉos sian energion al la esplorado pri unulinia kreskado. Li diris, ke nur en mito oni povas vidi rizon pli alta ol la homo, kaj se sukcesos la esplorado, la mito fariĝos realaĵo. ■

## ABONTARIFO DE EPC

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40



Sur strato de Chengdu

# En stratetoj de Chengdu


Teksto kaj fotoj de **LING YOUJUAN**

La stratetoj de Chengdu estas diferencaj de tiuj en urbetoj de orienta Ĉinio kaj ankaŭ de tiuj en urbetoj de norda Ĉinio.

La reto el stratetoj en Chengdu estas tre densa. Ambaŭflanke de la stratetoj estas butikoj kaj dometoj kun fenestroj kaj pordoj al la stratetoj. La fasadoj de tiuj dometoj estas formitaj el moveblaj lignaj tabuloj, kio estas tre oportuna por servi la dometon kiel butikoj. Ambaŭflanke de la stratetoj vi vidas butikojn, ĉiovendejojn, barbirejojn, tajlorejojn kaj tetrinkejojn. Tie estas ĉiuj profesioj, kiujn bezonas la ĉiutaga vivo de la loĝantoj.

La loĝantoj en tiuj stratetoj tre ŝatas tian medion. Ili rigardas la stratetojn kiel sian korton kaj zorgas pri ilia pureco. En tiuj stratetoj vi vidas, ke la loĝantoj ludas ŝakon, sunumas vestojn kaj babilas kun najbaroj. Parto de trinkantoj devas sidi ekster tetrinkejo pro la plena okupiteco de la sidlokoj. Promenante sur la stratetoj, vi povas percepti la malmodernecon kaj komfortecon de la vivo de la loĝantoj.





Loĝdomoj apud strateto



Legomo sekigata

Butikoj de bambuplektaĵoj



# Vojaĝo en Tibeto

de GUAN LI

**E**N la pasinteco Tibeto, kiel la “tegmento de la mondo”, estis malfacile atingebla ĉu por ĉinoj ĉu por eksterlandanoj. Sed nun, kun la progreso de la turisma afero de Ĉinio, vizito al Tibeto ne plu estas malfacila. Pli kaj pli multaj turistoj iras tien por proaokule vidi la misteran lokon.

La nove lanĉita flughaveno Gongga de Tibeto estas la plej alta flughaveno de la mondo kaj havas la plej longan kurejon de la mondo. Se vi volus viziti Tibeton, vi povus flugi de Hongkong rekte al Lhasa, kaj eliri el Ĉinio tra Katmanduo. Vi ankaŭ povus preni Pekinon kiel la startpunkton, ŝanĝi aeroplanon survoje en Chengdu kaj daŭre flugi al Lhasa. En ĝi luksaj kaj neluksaj hoteloj estas elekteblaj laŭ via prefero. Pro eventuala bezono la ĉambroj de la hoteloj estas provizitaj per oksigena sako. Sed fakte plejparto de la turistoj facile kutimiĝas al la klimato sur la atlebenajo kaj malofte uzas ĝin. Sed la temperaturo en Lhasa ŝanĝiĝas kaprice, kaj eĉ en somero vi bezonas lanveston.

Lhasa estas la ĉefurbo de Tibeto. Ĝi estas ne nur la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de Tibeto, sed ankaŭ budhisma sanktejo, tial en Lhasa estas multaj temploj kaj monaĥejoj, kaj dum tuta jaro senĉese alvenas pilgrimantoj. Vizitante La urbon, vi ne nur povos ĝui la pejzaĝon de la altebenajo, sed ankaŭ sperti la misteran kaj pacan atmosferon de religio.

La absoluta alto de Lhasa estas 3 667 metroj. Tio eventuale kaŭzos al vi alpan reakcion. Sed ni laŭeble plezurigos vin per nia servo dum la

vizitado.

En la unua tago vi vizitos Dazhao(Daĝaŭ)-templon. La tre vasta templo, konstruita en la 7-a jarcento, situas en la centro de la urbo. Ĝi frontas al la oriento. La ore tegmentita templo havas kvar etaĝojn. En la budhaj haloj vi vidos freŝkolorajn tibetajn freskojn sur la muroj. En la templo estas ora budho, kiun alportis princino Wencheng de Tang-dinastio (618-907), kiu estis edzinigita al la regnestro Sunzamkampo de Tubo (la nuna Tibeto).

Posttagmeze vi vizitos Luobulinka, la someran palacon de Dalai-lamao. En la tibeta lingvo Luobulinka signifas “ĝardenon de trezoroj”. Sole la nomo jam povas vekti ĉe vi belan imagon pri la loko. Luobulinka estis konstruita en la 18-a jarcento. Ĝi estis loko, kie Dalai-lamao restadis kaj okazigis gravan ceremonion en somero. La palaco konsistas el tri grupoj da imponaj konstruaĵoj, kiuj kovras 360 000 kvadratajn metrojn. La ĝardeno de la palaco estas bele verdigita. Se vi venos al Lhasa ĝuste en la tibeta Novjara Tago, vi povos ĝui tie ege interesajn spektaklojn por la festo.

En la sekvanta tago vi vizitos Potala-palacon. En la sanskrito Potala signifas “budhisman sanktejon”. Ĝi estas vintra palaco de Dalai-lamao, konstruita en la 7-a jarcento. La ĉefa parto de tiu kastelforma konstruaĵo havas 13 etaĝojn kaj altas 110 metrojn. La fronto de la palaco larĝas 360 metrojn. La palaco estis konstruita sur montodeklivo, tial ĝiaj konstruaĵoj kvazaŭ sidas sur ŝtuparo, unu super alia. En la labirinta palaco vi vidos

8 stupaojn por la relikvoj de Dalai-lamaoj. La stupaoj estas ore tegitaj kaj inkrustitaj je gemoj kaj jadoj. Ĉirkaŭe sur la muroj estas koloraj kaj enhavoriĉaj freskoj, kaj ĉie en la palaco vi povos vidi sennombrajn valoregajn antikvaĵojn, juvelojn, artaĵojn, sutrojn, budhostaĵojn kaj liturgiajn ilarojn.

En la tria tago ni vizitos Zhebang-templon sur montodeklivo. En la templo kontinuas konstruaĵoj. En la Granda Preĝejo, la ĉefa konstruaĵo de la templo, kiu povas enteni 8 000 monaĥojn, vi vidos imponan scenon el miloj da buteraj lampoj brulantaj, sennombraj preĝantoj kaj multaj lamaoj movantaj rozarion kaj preĝradon en la mano.

Post vizitado de la temploj de Lhasa, ni iru al la fama Bajiao (Baĝjaŭ)-strato en la centro de la malnova urboparto de Lhasa por percepti la vivon de ordinaraj tibetanoj. La straton plivigligas multaj butikoj. En la strato vi vidos abundon da interesaj kaj groteskaj luksaĵetoj kaj tre diversaj metiartaĵoj. Laŭ mi, kolĉeno el besta osto kaj arĝenta braceleto estas aĉetindaj.

La nepoluciita aero sur la altebenajo estas ege pura kaj freŝa. Sub la lazura firmamento la tutjare neĝkovrita Himalajo reflektas sunradiojn. Sur tiu maldense loĝata tero vi ĝuos kvietecon kaj trankvilecon kvazaŭ en paradizo.

Pro la aparta klimato julio kaj aŭgusto estas la plej bona sezono por vojaĝi en Tibeto. Se vi venos en tiu tempo, vi havos la ŝancon pasigi kun la lokanoj la tibetan Novjaran Tagon, kaj tiam vi povos vidi pli da spektakloj neforgeseblaj. ■

# Liu Wannian strebas por pentri veran Tibeton

de CHEN SI

**P**RO malhelpo de senlimaj altaj montaroj, en la okuloj de multaj ĉinoj Tibeto estas malproksimega loko vualita de mistera koloro. Sed antaŭ nelonge en ekspozicio de pentraĵoj mi rigardis ĝian veran fizionomion. Mia amiko, kiu iam vizitis Tibeton, diris al mi, montrante iun el la pentraĵoj de Liu Wannian: "Jen la vera Tibeto."

Pentristo s-ro Liu Wannian estas fortika viro. Sur lia bruna vizaĝo brilas paro da grandaj okuloj sub dikaj brovoj. Ĉio ĉi elspiras tibetanane bravecon. Sed demandinte pri lia deveno, mi informiĝis, ke li estas pursanga hano. En 1949 li naskiĝis en la gubernio Qin'an, Gansuprovinco de nordokcidenta Ĉinio. La loko kun forta kultura gusto estas ne nur lulilo de la unua feŭda centrafizisma dinastio de Ĉinio, sed ankaŭ naskiĝloko de la granda romantika poeto Li Bai (701-762). La prapatroj de Liu estis intelektuloj kaj poste falis la familio. S-ro Liu penadis por vivtenado jam de sia infaneco. Lernante en elementa lernejo li interesiĝis pri ombroteatro kaj faris diversajn figurojn el kartono. Poste influite de veterana pentristo pri tradicia ĉina pentraĵo, li komencis kopii antikvajn pentraĵojn.

En 1971 por vivtenado li sola venis en Tibeton. Li transgrimis ĉenon kaj ĉenon da flavaj montoj, trairis blankan alkalantan teron, transiris la ĉielskrapantan Tanggula-montaron kaj fine eniris en la kakian Tibetan Altebenaĵon. Tiam li sentis senprecedencan plezuriĝon. Li profunde enamiĝis al la mirinda loko.

La tibetaj montoj estas diferencaj de la alilokaj. Ili formiĝis leviĝinte el marfundo pro karambolo de terkrustoj. Sur ili vidiĝas postsignoj de erozio de furiozaj ondoj. En Tibeto pluvas malofte. Pro eflorosko la antaŭa marfundo fariĝis malkompakta tersurfaco. Tie estas tutjare nekovritaj montoj, kaj en la valoj estas rokoj, gruzoj kaj kotejoj. Jen originala fizionomio de Tibeto.

Liu Wannian faris multe por

surpaperigi la apartan fizionomion de la Tibeta Altebenaĵo. Li provis per skizoj, akvareloj kaj olepentaĵoj, sed ne havis kontentigajn sukcesojn. En 1979, kiam li studis en la Sichuan-a Belarta Instituto, li hazarde vidis tradician ĉinan tuĉpentaĵon spegulantan trajtojn de la Leŭsa Altebenaĵo. Li estis edifita de tio. Reveninte en Tibeton, li decidis pentri la fizionomion de la Tibeta Altebenaĵo per tuĉpikturo, li provis plurfoje per la tradicia pikturo, sed ne sukcesis plene montri la trajtojn de la tibetaj montoj. Li do decidis ŝanĝi pentr-manierojn kaj farbojn. Li aplikis diferencajn pentr-materialojn, sed ne atingis deziratan rezulton. Post ripetada provo li kreis apartan pentr-manieron, dank' al kiu li sukcesis en sia strebado. Jen aperis sur liaj pentraĵoj la gruza fluo, eflorskinta ŝtono, seka alkala dezertejo, glacirivero, kaj herbokovritaj termasoj de Tibeto, kiuj formis apartajn trajtojn de liaj pentraĵoj.

La pentraĵoj de s-ro Liu Wannian havas vastan amplekson,

Paŝtado en vintro






Sur la Tibeta Altebenajo



kvankam ili prezentas nur parton de ondanta montaro. La pentraĵoj vekas ĉe rigardantoj la imagon pri senlimeco, kvazaŭ la monto etendiĝas trans la papero dank' al la krudaj strekoj kaj klare distingeblaj nuancoj.

Li uzas ĉefe la nigran koloron kaj aldone la kolorojn puncan, safiran kaj okran, kiuj faris la pentraĵojn majestaj kaj helfreŝaj.

En la lastaj jaroj s-ro Liu akiris multajn honorojn. Liaj verkoj estas ne nur konservataj en la Ĉina Arta Muzeo, sed ankaŭ donacitaj al ŝtataj gastoj en la nomo de la ĉina registaro. Li neniam ripozigis sian penikon por manifesti verajn pejzaĝojn de Tibeto. Li deziras, ke oni pli multe konu Tibeton, lokon plenan de fascina ĉarmeco pere de liaj pentraĵoj. ■

Matena nebulo





Majesta monto

# Du libroj el Japanio

de IVAN KO

*JAPANAJ VINTRAJ FABELOJ*, redaktita de Yosikawa Syōiti, eldonita de SAT-PARIZO, presita en Japanio, 153 p., prezo neindikita.

Jen estas kolekto de artikoloj kaj poemoj originale verkitaj de Miyamoto Masao, fame konata japana esperantisto, kaj aperintaj en diversaj gazetoj en la okdekaj jaroj. Iom pli ol duono de la artikoloj temas pri Esperanto, esperantistoj, Esperantomovado aŭ historio de Esperanto.

En la libro troviĝas nur du pli longaj artikoloj, kaj unu el ili traktas pri "Ĉina Antologio 1919-1949". La aŭtoro opiniis, ke rilate al traduk-arto la ĉinaj esperantistoj plej elstaras en Azio, kaj la japanaj multe postrestas. Aliflanke, li ankaŭ kritikis kelkajn esprimojn en la antologio, kiujn li opiniis malbonaj aŭ malĝustaj, kiel ekzemple la vorto "longjara". Li rimarkigis, ke anstataŭ "longjara" oni devas diri "multejara" aŭ "longtempa", ĉar ekzistas neniu pli longa jaro ol tiu, kiu havas nur 365 aŭ 366 tagojn.

La aŭtoro, kiu foje vizitis Ĉinion, ankaŭ montris sian amikan helpemon al siaj ĉinaj kolegoj proponante, ke la japanaj esperantistoj aĉetu la antologion kaj aliajn ĉinajn Esperantajn eldonaĵojn kaj tiel havigu al ili eksterlandan valuton, kiun ili multe bezonas. Li kredis, ke tio estas la plej bona el la bonaj metodoj por helpi la ĉinajn kolegojn.

La verkoj de Miyamoto Ma-

sao kolektitaj en tiu ĉi libro liveras al la legantoj ankaŭ multe da valoraj informoj pri la Esperanta movado, kiuj estas apenaŭ troveblaj en aliaj libroj. Sekve, tiu ĉi libro estas rekomendinda al ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas precipe pri la historiaj materialoj de Esperanto.

Parenteze, la enhavo de la libro havas nenion komunan kun "fabeloj", des malpli kun "vintraj fabeloj", sed la redaktinto faris neniun klarigon pri tiu ĉi dubinda titolo.

*RAKONTO KOMENCIĜANTA PER TERPOMOJ* de Masaĵi Iŭakura, tradukita de Sejŝro Nomra el la japana lingvo, ilustrita de Joŝiko Ueda, eldonita de Biblioteko Kolombo, Japanio, 91 p., prezo: 500 enoj.

Kiel la verkinto de tiu ĉi libreto diris en sia postparolo, li kaj liaj kvar infanetoj kaj lia tuta familio vivis en senlima manko en la gubernio Tojama post la Dua Mondmilito. Tiam manĝaĵoj ne estis facile akireblaj, nek kajeroj, nek farbokraĵoj, nek bildrakontaj gazetoj. Sekve, la infanetoj ripete petadis lin rakonti, kaj tiel naskiĝis la libreto kun la supra titolo.

Tiu ĉi libreto enhavas du rakontojn. La unua temas pri knabo en vilaĝo en la norda regiono de Japanio. En tiu tempo la japanaj militaristoj faris agresan militon sur la kontinento Azio. Eble spegulante tiun tempo-fluon, la ludil-vendejoj en la urbo elmontris multe da trumpetoj kun ruĝa kvasto, kaj pli

kaj pli da knaboj amis ludi tiujn trumpetojn. La gepatroj de la knabo supre menciita estis tre malriĉaj, kaj ili ne povis aĉeti por li trumpeton. Lia samklasano havis latunan trumpeton donacitan de lia onklo en Tokio. Finfine la knabo sukcesis prunti la trumpeton de tiu samklasano kontraŭ la promeso kapti por la lasta kelkajn grilojn, kvankam li sciis, ke la kaptado estas ege malfacila.

La dua rakonto temas pri knabo, kiu spertis la riztumulton, kiu disvastiĝis tra la tuta Japanio en la jaro 1918. Iun tagon la knabo surprizite rimarkis, ke iu junulo en laborvesto kun iom klinita kapo aperis el malantaŭ la arbaro sekvata de du policianoj. Liaj manoj estis ligitaj malantaŭ la korpo. Maldika ŝnuro etendiĝis de liaj manradikoj, kaj ĝia fino estis tenata de unu el la policianoj. Reveninte hejmen, la knabo diris tion al la patrino, kaj ŝi sciigis al li, ke ŝi aŭdis, ke denove okazis tumulto en la apudmara urbo. Ŝi diris plue, ke tiu kompatinda junulo certe enmiksiĝis en la aferon.

Aldone, la tradukinto de tiu ĉi libreto rakontis en siaj notoj, kiel la agresiva milito de japanaj militaristoj finiĝis per neevitebla kaj plena malvenko. Tiam la streĉiĝo de lia animo subite malaperis el lia koro, tamen momenton li estis en kelka embaraso, sed tuj poste en lia koro naskiĝis kaj rapide kreskis freŝa sento de vivanta homo, kiu nun povis sin etendi libere, spiri profunde kaj vivi laŭ sia propra volo. ■

# En la antikva urbo Qingzhou

Teksto de LI QIANG

Fotoj de YAN JIN

**E**N tre tre frua tempo la tero de Ĉinio dividiĝis en 9 ŝtatojn, kaj unu el ili portis la nomon Qingzhou (Ĉing-ĝou). Kompreneble, tiam la ŝtato estis tre vasta. Ĝi kovris grandan parton de la nuna Shandong-provinco, kaj la nuna Qingzhou estas nur ĝia malgranda parto. Mi havis la ŝancon viziti tiun lokon nomatan "Orienta Antikva Ŝtato", kaj post la reveno mi skribis tiun ĉi mallongan artikolon.

En la ore brilanta muzeo de la urbo konserviĝas pli ol 20 000 valoraj antikvaĵoj. Ili estas miniaturo de la brila antikva kulturo de Qingzhou. Abundo da grafikaĵoj,

tekstoj kaj antikvaĵoj montras, ke antaŭ 7 000 jaroj jam vivis prapatroj de la homoj. Qingzhou estas unu el la fontoj de la ĉina antikva civilizacio.

Ne malproksime de la ruino de la okcidenta urboparto de Qingzhou estas la Kiosko de Sinjoro Fan, kaj post ĝi estas la Templo de Tri Eminentuloj (s-roj Fan Zhongyan, Ouyang Xiu kaj Fu Bi). Ili oficis kiel prefekto de Qingzhou en la Norda Song-dinastio (960-1127). En 1050 Fan Zhongyan oficis kiel prefekto de Qingzhou. Li estis estimata de la popolo pro sia honesteco. Post lia forpaso la popolo nomis iun puton per lia nomo kaj starigis super la

puto sesangulan kioskon, kiu havas rondan truon en la mezo. Ĉirkaŭ la kiosko kreskas maljunaj sed prosperaj katalpoj kaj soforoj.

Forlasinte la kioskon, se oni iras ĉ. 100 m laŭ ombrata vojeto, oni povas atingi Shunhe-pavilonon, konstruitan sur alta ŝtona bazamento laŭlonge de rivero. La pavilono estis frekventata de la fama poetino Li Qingzhao (1084-1155), kaj nun la pavilono servas kiel memordomo por ŝi.

Ambaŭflanke de Shinan-strato staras po delikate skulptita ŝtona arkado, kiu ĉiam vekas intereson ĉe vizitantoj. La arkadoj, kun la nomo Wuchao-pordo, estas restaĵo de la domo de Hengwang-princo de Ming-dinastio (1368-1644). La domo estis tre vasta palaco. Sed poste ĝi detruigis de incendio kaj postrestis nur la ŝtonaj arkadoj kaj imagitaj bestoj antaŭ ili. Tiu restaĵo estas konata kiel valora antikvaĵo.

Mi vizitis ankaŭ Yunmen (Junmen)-monton kaj Kamelomonton ekster la urbo.

Sur la supro de Yunmen-monto estas kaverno, kiu aspektas kiel pordo, rigardate de fore. Ĉiĉerono diris, ke en somero kaj aŭtuno, nubofloko travagas la kavernon, kaj la temploj sur la monto kvaŭzaŭ flosas en nubaro. La monto ne estas alta, sed ĉie arbarizita, kaj ŝtona ŝtuparo kondukas ĝis la su-

Moskeo en la urbo





Strato de Qingzhou

En la kvieta monto estas multaj temploj kaj surrokaj gravuraĵoj. Inter ili la plej fama estas lapidara ideogramo signifanta "longvivecon". La ideogramo altas 7.5 metrojn kaj larĝas 3.7 metrojn. Tiu ĉi plej granda ideogramo, skulptita antaŭ 400 jaroj, estas senĉese rigardata de turistoj.

Kontraŭ Yunmen-monto kuŝas Kamelo-monto, simila al kuŝanta kamelo. La monto estas same alta kiel Yunmen, sed pli kruta. Laŭ la ŝtona stuparo oni povas atingi la

majestan Haotian-palacon sur la ebena montosupro. La palaco kun historio de 700 jaroj longas 150 metrojn kaj larĝas 100 metrojn. En ĝi estas la Ĉiela Pordo, Ĉiela Rivero, Ĉiela Ponto, Ĉiela Fonto, kaj ankaŭ la Palaco de la Ĉiela Imperiestro, Septrezora Pavilono kaj eĉ teatro.

Sur la sudorienta klifo de la ĉefa pinto de Kamelo-monto viciĝas 5 grandaj kaj malgrandaj kavernoj, en kiuj estas 638 budhostatuoj. El ili la plej granda altas 7 metrojn, kaj plej malgranda


nur kiel pugno. La tria kaverno estas la plej granda kaj plej frue fosita. En la mezo de ĝia fundo sidas la statuo de Ŝakjamunio en alto de 5 metroj. Liaj vangoj estas pufetaj, la nazo gracie rekta kaj la brovoj milde arkaj. Ambaŭflanke de li staras Avalokitesvaro kaj Mahasthamaprapta, kun staturo gracie svelta kaj okuloj fascine belaj. Ili estas valoraj verkoj de la antikva ĉina skulpturo kaj valoraj materialoj utilaj por studi pri skulpturo, pentrarto kaj budhisma evoluo de la antikva Ĉinio. ■






La pavilono Wangshou sur Yunmen-monto

En ŝtonkaverno de Kamelo-monto



La Kiosko de Sinjoro Fan



# Mia naskiĝloko Leting

**M**I naskiĝis en apudmara vilaĝo. Mia patro diris al mi, ke en 1942, kiam mi estis nur unujara, mia naskiĝloko suferis de senprecedence serioza sekeco kaj la plago nuligis la tutan rikolton, tial la tieaj loĝantoj unuj post aliaj fuĝis aliloken. Ankaŭ mia familio forlasis la hejmlokon, la gubernion Leting de Hebei-provinco, kaj fiksluĝis en la nordorienta parto de Ĉinio. Poste mi havis profesion en Pekino. La tempo flugis sagrapide kaj de tiam forpasis jam duonjarcento. Mi forlasis Leting en mia infaneco, tial ĝi postlasis neniun signon en mia memoro. Miaj gepatroj diris al mi, ke mia naskiĝloko estis postĝinta, en la gubernio ĉie etendiĝis nur alkala tero.

En la pasintaj multaj jaroj mi ĉiam sopiris al la naskiĝloko. Tie nun ja ne troviĝas miaj familianoj. La domo de miaj prapatroj vendiĝis al aliaj antaŭ longe. Tamen la tieaj moroj forte min allogis. Mi deziregis reveni tien por viziti miajn samvilaĝanojn, karesi la karan teron, sed pro okupiteco mia aspiro ne realiĝis dum longa tempo. Mi havis la ŝancon veturi al Leting nur en la aŭtuno de 1992.

Mi trajne veturis orienten de Pekino kaj post 4 horoj mi atingis la urbon Tangshan, tie mi prenis aŭton kaj daŭrigis mian vojaĝon sudorienten kaj post pli ol unu horo mi atingis la gubernian urbon Leting.

En la sekvanta tago post mia alveno mi min direktis al maro por rigardi, kiel nun statas la marbordo, kie miaj patro kaj frato salfaris kaj miaj patrino kaj fratino fiŝis

antaŭe.

Mia aŭto pafis sin al la marbordo. Ambaŭflanke de la ŝoseo anstataŭ blanka alkala tero vidiĝis orflava rizkampo. Oni diris al mi, ke dank' al la 40-jara reguligo, la tiea kampo multe fekundiĝis. Subite malaperis la rizkampo kaj antaŭ miaj okuloj aperis vasta spaco. Ho, mi proksimiĝis al la marbordo. Prezentiĝis antaŭ miaj okuloj koloza blanka konstruaĵo. Giganta ŝipo ankriĝis en la kvietaj maro. Jen Tangshan-haveno. Ĝi estas neniu alia, ol la "norda granda haveno", kiun d-ro Sun Jatsen, kiu gvidis la ĉinan popolon en renverso de Qing-dinastio, la lasta feŭda dinastio de Ĉinio, en sia Projekto de Landkonstruo planis konstrui en 1919.

Pro historiaj kaŭzoj oni ne en-

treprenis la konstruadon de la haveno, kiam vivis d-ro Sun Jatsen. Ĝi ekkonstruiĝis nur antaŭ 3 jaroj. Nun oni finis parton de la unuaperioda konstruado kaj du 15-mil-tonelaj ankrejoj jam estis lanĉitaj.

Akompanate de la direktoro de la haveno, mi iris sur la ŝipon. La ŝipo havas 3 grandajn holdojn, ĉiu profundas pli ol 10 metrojn. 3 grupoj ŝovelas per siaj longaj brakoj karbon amasigitan kiel monto sur la bordo kaj senĉese transŝutas ĝin en la holdojn. Mia akompananto diris al mi, ke en la lasta tago antaŭ mia alveno oni transportis proksimume 20 000 tunojn da salo de la haveno al Ŝanhajo.

La loko estas ideala por konstrui havenon, ĉar tie la marbordo estas rekta kaj kruta, akvo profun-

En salfarejo





En salikoko-bredejo

da, ne ŝlima nek glaciiganta. La perspektivo de la haveno estas brila. Post plenumiĝo de la duaperioda konstruado, la haveno povos en- kaj elŝipigi 30 milionojn da tunoj da varoj ĉiujare, kaj espereble ĝi fariĝos grandega haveno samkiel Novjorko en la estonteco.

Mia naskiĝloko situas ĉe la marbordo. Tie la ekonomia konstruado kaj popola vivo strikte ligiĝas kun la vasta maro. Mi multfoje informiĝis pri la tiea vigla marproduktado. La bongustaj peneoj (*Penaeus orientalis*) kaj kraboj sur tablo estas malofte vidataj en Pekino, tial mi decidis rigardi la bredadon de marproduktaĵoj.

Jam forpasis la rikolta tempo de peneoj, tial mi povis nur viziti prilaborejon de marproduktaĵoj. En la Dua Fridigejo de Leting investita kune de Ĉinio kaj Japanio, mi vidis amasegon da peneoj. Kiam mi eniris en la fabriksdomon, mi vidis, ke laboristoj klasis la peneojn laŭ ilia grandeco, senkapiĝi, lavi kaj enkestigi ilin, post tio ili metas la peneojn en fridigan konservejon. S-ro Li, respondeculo de la fabriko, konigis al mi, ke krom peneoj, oni tie fridigas ankaŭ legomojn, nereojn kaj konkulojn, kiuj eksportiĝas ĉefe al Usono, Japanio kaj Eŭropo.

S-ro Gao, inĝeniero de la Akvo-produkta Buroo de la Gubernio, konigis al mi la historion de la disvolviĝo de la tieaj marprodukta-

ĵoj: Leting-gubernio havas longan marbordon kaj vastajn malprofundaĵojn, kiuj dotis la gubernion per bonaj ekologiaj kondiĉoj por disvolvi la marproduktaĵojn, tamen pro diversaj kaŭzoj tie la marproduktado estis nulo en la pasinteco. En 1983 iuj loĝantoj komencis bredi peneojn kaj en la sama jaro la pohektara penea enspezo atingis 3 000 usonajn dolarojn, kiuj estis tre rimarkindaj por la tieaj loĝantoj siatempe. Oni do unuj post aliaj sin direktis al la marbordo kaj ekokupiĝis pri bredado de peneoj. En 1988 la penea produktokvanto de Leting okupis la trian lokon inter la peneo-produktantaj gubernioj kaj urboj de la tuta lando. Nun en Leting oni bredas ne nur peneojn, sed ankaŭ konkulojn, meduzojn kaj aliajn. Ili entreprenas senprecedencan "bluan revolucion". La marproduktaĵoj jam fariĝis ekonomia bazo de la gubernio. La gubernio alte taksas sciencan bredadon. Ĝi popularigas la sciojn de bredado de peneoj kaj konkuloj pere de funkciigo de kursoj, televida instruado, presado kaj distribuo de lego-materialoj. Por pli grandigi la produktadon, oni enkondukis fremdajn kapitalojn. Nun la gubernio funkciigas plurajn entreprenojn investitajn kune de Leting, Japanio, Koreio kaj Taiwan.

Nun en Leting mi havas nur unu parencon, t.e. mia kuzo, kompreneble mi volis lin viziti. Mi vi-

dis lin nur unu fojon antaŭ pli ol 20 jaroj. Li loĝas en tre malgranda vilaĝo, malproksima de urbeto. Mia ĵipo forlasis la ebenan asfaltitan ŝoseon kaj ruliĝis sur malglata vilaĝa tervojo. Post ni leviĝis foje refoje nuboj da polvo. Mi plurfoje demandis pri la vojo kaj fine iu bonkora knabo kondukis min en la hejmon de mia kuzo.

Mia kuzo estis tre ĝoja vidi min. Laŭ la ĉina moro oni devas prepari abundajn manĝaĵojn por regali la gastojn, precipe malofte vidatajn parencojn kaj amikojn. Sed mi estis gasto neatendita. Mia kuzo nenion preparis kaj plie en la vilaĝo ne troviĝas butikoj. Por regali min li vere embarasiĝis. Ankaŭ lia edzino estis maltrankvila. Li volis iri al la urbeto por aĉetado, sed informiĝinte, ke mi restos nur pli ol unu horon ĉe li, li do domaĝis foriri de mi. Fine lia edzino sukcesis deprunti iom da viando por la pladoj. Feliĉe, ke mia kuzo mem bredas kokojn kaj en lia hejmo ne mankas ovojn. Li povis preni legomojn en sia propra korto. Kvankam la legomoj estis malmultspecaj, tamen tre freŝaj. La vivrimedo de mia kuzo ne estas malfacila. En lia korto staras 5 grandegaj vazoj plenplenaj de tritiko kaj rizo. Sur la tegmento de lia domo estis sekigita amasego da orflava maizo. Li bredas ankaŭ porkojn en sia korto. Li estas ne nur eminenta terkulturisto, sed ankaŭ lerta meblisto. En la lastaj jaroj la vivo de la kamparanoj pliboniĝis kaj multaj familioj volas havigi al si novajn meblojn, tial mia kuzo ĉiam estas okupita kaj de tio li multe enspezas.

Pro tempomanko mi restis en Leting nur 4 tagojn. La intimaj voĉoj de miaj samvilaĝanoj, la honestaj moroj de la loko estas neforgeseblaj por mi. En mia naskiĝloko pli kaj pli progresis produktado. Ĝi fariĝas pli kaj pli prospera kaj aminda. Mi ekŝatis ĝin pli ol antaŭe. Tamen mi devis diri kun granda bedaŭro: "Ho, mia naskiĝloko, mi deziras reviziti vin post ne tro longa tempo." ■




Magnolio


# Tropikaj floroj

Fotoj de LIU SIGONG

Smeralda florphanto



Kakto



# Ĉu sur hirundo aŭ suŝuang-birdo?

## — Pri la nacia trezoro galopanta bronza ĉevalo

de WU WEN

**O**KTOBRE de 1969, estis elterigita rara trezoro galopanta bronza ĉevalo en tombo de la Orienta Han-dinastio (25-220) de Wuwei, Gansu-provinco en nordokcidenta Ĉinio. En la tombo estis trovitaj sume 39 bronzaĵoj. Inter ili plej famas galopanta ĉevalo kun piedo premanta flugantan birdon. Fakuloj konstatis post esplorado, ke la mortinto nomiĝis Zhang Jiang (Ĝang Ĝjang), kiu markiziĝis pro sia merito en la komenco de la dinastio. Kiam regis imperiestro Mingdi (58-75 sur trono), li funkciis kiel prefekto de Wuwei. La retrovo de la trezoro estis multe atentata de la publiko.

### EMBLEMO DE LA ĈINA TURISMO

La bronza ĉevalo, kun alto de 34.5 cm kaj longo de 45 cm, galopas kun la kapo alte tenata kaj tri piedoj levitaj kaj la dekstramalantaŭa piedo premanta la dorson de fluganta birdo. La antikva artisto montris la fulmrapidecon de galopanta ĉevalo, kiu galopas premante la plenforte flugantan birdon. Aparte mirindas, ke oni prenis flugantan birdon kiel soklon de la tuta statuo kaj tiele bone solvis la problemon kiel subporti la ĉefan parton de la artaĵo, dank' al lerta aplikado de mekanika ekvilibro en arta kreado.

Septembre de 1971, fama ĉina verkisto kaj historiisto Guo Moruo (Guo Moĵūo) rigardis la galopantan bronzan ĉevalon en la Provin-

ca Muzeo de Gansu kaj admiris: "Oho, ĝi estas trezoro el la trezoroj! La ĉevalo galopas sola en la ĉielo. Eĉ en la tuta mondo ĝi estas unuaklasa raraĵo!" De post 1973 Ĉinio okazigis ekspozicion de historiaj objektoj en Japanio, Usono, Britio, Francio, Italio, Svedio kaj aliaj landoj, kun la galopanta bronza ĉevalo kiel la ĉefa, kiu estis honorita kiel "la kulmino de la antikvaj ĉinaj artaĵoj". En 1983 la Ĉina Turisma Administra Buroo difinis la figuron de la bronza ĉevalo kiel emblemon de la ĉina turismo. Ĝi estas simbolo de la ĉina nacio, kiu kreis la brilan antikvan civilizacion kaj heroe marŝas al la bela morgaŭo.

### ĈIELA ĈEVALO GALOPANTA EN LA AERO


Wuwei, kiel fama historia urbo de Ĉinio, estis grava loko sur la antikva Silka Vojo. La Silka Vojo trairis nordokcidentan Gansuprovincon je pli ol 1 000 km sude de Qilian (Ĉjiljan)-montaro kaj norde de Mazong-, Heli- kaj Longshou-montoj. La plej granda larĝo de la vojo estis 100 km kaj la plej granda mallarĝo — nur 30 km. Ĉar la vojo etendiĝis okcidente de la Flava Rivero, oni nomas ĝin la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero. De la antikveco ĝi estas nepre trairata por atingi Xinjiang (Ŝinĝjang), centran kaj okcidentan Azion. En la regiono sidas de oriente okcidenten la urboj Wuwei, Zhangye (Ĝangje), Jiuguan (Ĝiŭcĵuan) kaj Dunhuang. En Han-dinastio (206 a.K. — 220

p.K.) tie plurfoje okazis milito kun hunoj, nacimalplimultanoj norde de Ĉinio. Por rezisti kontraŭ la invadintaj hunaj rajdistoj, imperiestro Wudi (141-87 a.K. sur trono) de la Okcidenta Han-dinastio urĝe bezonis bonrasajn ĉevalojn por reorganizi siajn rajdistajn trupojn. Tiam ofte vidiĝis gregoj da sovaĝaj ĉevaloj ĉe Wowarivero proksime al Dunhuang. Oni rimarkis eminentan ĉevalon inter ili, kaptis ĝin kaj tributis ĝin al la imperiestro. Por diigi la ĉevalon oni teksis tutan rozarion da mensogoj, dirante, ke ĝi elsaltis el la rivero. La imperiestro kredis tion, rigardis ĝin magia ĉevalo kaj verkis "Kanto de la Ĉiela Ĉevalo". Tial Dunhuang ricevis la belan nomon "la hejmloko de la ĉiela ĉevalo" kaj la vorto "Wowa" estis anekdoto ofte priskribita en la ĉina klasika literaturo. Poste imperiestro Wudi informiĝis, ke en la regno Dawan (en Fergana-baseno de Rusio) produktiĝas famaj ĉevaloj Hanxue (Hanŝjue), kaj en 104 a.K. sendis siajn subulojn ŝanĝi oron kontraŭ tiaj ĉevaloj. Pro la mal-konkordo de opinioj la subuloj malsukcesis en la ŝanĝado kaj estis mortigitaj. La imperiestro bolis de kolero kaj ordonis generalon Li Guangli komandi trupojn por konkuri la regionon. Suferinte grandan perdon, Li finfine militkaptis dekojn da bonrasaj ĉevaloj kaj 3 000 aliajn ĉevalojn. Imperiestro Wudi donis la nomon ĉiela ĉevalo al Hanxue-ĉevalo kaj verkis "Kanto de la Ĉiela Ĉevalo" por aludi sian meriton.

Historia libro diras, ke tia ĉevalo kapablas kuri sur nuboj kaj eĉ levi sin alten al la ĉielo. En antikva tombo en Dingjiazha (Dingĝjaĝa), Jiuquan, vidiĝas fresko pri ĉiela ĉevalo gapopanta super montpintoj. La galopanta bronza ĉevalo elterigita en Wuwei ja montras la saman ĉielan ĉevalon. “Notoj pri Imperiestro Wudi” en la historia libro Hanshu diras, ke la ĉevalo kun akraj hufoj lasas postsignojn, preminte ŝtonon. En Zhangye estas fama ŝtonkavernaro de la Ĉevalhufo Templo. En la 9-a ŝtonkaverno vidiĝas postsigno de ĉevalhufo. Mito diras, ke ĝi estis farita de ĉiela ĉevalo, kaj tial la templo ricevis la nomon.

## NATURA PAŝTEJO DE ĈIELAJ ĈEVALOJ

En la antikveco ĉinaj silkaĵoj estis rigardataj kiel raraĵo en centra kaj okcidenta Azio. Tieaj komercistoj venis negoci en Ĉinio laŭ la Silka Vojo. Ili ŝanĝis siajn ŝtofojn, feltojn kaj ĉevalojn kontraŭ ĉinaj silkaĵoj. La Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero estis vojo nepre trairata por enkonduki en la landinternon bonrasajn ĉevalojn. Dank’ al la naturdotitaj kondiĉoj, bonrasaj ĉevaloj paŝtigas kaj multiĝas tie. La pli ol 1 000-kilometra Qilian-montaro en la koridora regiono ĝenerale estas 3 000-4 500 m super la marnivelo. Tie multaj lokoj altaj je pli ol 4 000 m super la marnivelo kaj tutjare neĝkovritaj estas “surmonta akvorezervejo” de la regiono. La riveroj Shiyang (Ŝijang), Heihe kaj Shule, kun degelinta neĝo de sur la montaro kiel sia fonto, nutras la teron kaj estigas en Gobio oazojn, kiuj funkciis kiel naturaj paŝtejoj en la antikva Ĉinio. Dum la regado de imperiestro Wudi estis multaj bredejoj de bonrasaj ĉevaloj en la koridora regiono. Enkondukte, la bonrasaj ĉevaloj hibridiĝis al la lokaj kaj tiel estis plibonigita la raso de ĉevalo en la landinterno. La ĉevalbredejo Shandan sub la piedo de Qilian-montaro estas la plej granda kaj plej antikva en Ĉinio. Antaŭ 2 000 jaroj, kiam generalo



La galopanta bronza ĉevalo

Huo Qubing militiris okcidenten kontraŭ hunoj, li starigis tie barakojn.

Multaj legendoj pri ĉiela ĉevalo kaj historiaj objektoj en la koridora regiono strikte rilatas al la menciita historio. Surbaze de tio, oni teksis diversajn legendojn pri la diigita ĉiela ĉevalo kaj artistoj kreis valorajn artaĵojn imite al la ĉevalo.

## ĈU SUR HIRUNDO AŬ SUŜŬANG-BIRDO?

Nun en la ĉina akademia rondo estas malsamaj opinioj pri la fluganta birdo premata de la bronza ĉevalo. Komence oni konstatis, ke ĝi estas figuro de hirundo, tial aperis la diro “ĉevalo sur hirundo”. Poste iuj diris, ke ĝi estas figuro de suŝŭang-birdo, tial aperis alia diro “ĉevalo sur suŝŭang-birdo”. Sed laŭ aspekto, la birdo havas platan voston malsimilan al la vosto de la hirundo. Mito diras, ke suŝŭang-birdo estas la dio de vento. Komence ĝi aperis en la formo de cervo, kiu poste transformiĝis en birdon. Ĝi neniam ekzistis en la realo, ĉu ĝi havus konkretan figuron? Tiukaze, aperis novaj nomoj, kiaj korvo, fluganta aglo kaj fluganta falko, kaj la galopanta bronza ĉevalo ricevis la nomojn Ĉevalo sur Korvo, Ĉevalo sur Flu-

ganta Aglo, Ĉevalo sur Fluganta Falko k.a.

La 15-an kaj 22-an de aprilo 1992, oni aperigis en ĵurnalo de Gansu serion da artikoloj sub la titolo “Pri la Sekreto de Ĉevalo Premanta sur Suŝŭang-birdo” kaj konigis la opiniojn de du junaj fakuloj pri ĝi. Ili konfirmis la diron, argumentante, ke kiam Zhang Jiang funkciis kiel prefekto, li ordonis projekti la artaĵon Ĉevalo sur Suŝŭang-birdo, prenante la figurojn de ĉiela ĉevalo kaj suŝŭang-birdo, totemoj kultataj de la plebanoj de la Orienta Han-dinastio, kaj pretis tributi ĝin al la imperiestro. Laŭ la plano de Zhang Jiang, senomaj artistoj elfaris la artaĵon, kun modelo de la rase rebonigita ĉevalo de la koridora regiono kiel figuro de ĉiela ĉevalo kaj kun birdo propra al Wuwei kaj simila al suŝŭang (ĝi rapide fluganta estas pli granda ol hirundo, havas mallongajn kruojn, alte tenatan kapon kaj maldikan kolon, kiel figuro de suŝŭang-birdo.) Sub la aŭspicioj de Zhang Jiang estis faritaj du serioj da galopantaj bronzaĵoj ĉevaloj. Unu el ili estis tributita al la kortego kaj la alia estis metita en la tombon de Zhang Jiang.

Malgraŭ diversaj diroj pri la bronza ĉevalo, oni preferas nomi ĝin Ĉevalo sur Fluganta Hirundo, eble pro tio, ke la nomo estis donita plej frue. ■

# La sorĉita floro

de ELISA VAZQUEZ (Argentino)

**E**STIS du vilaĝetoj disigitaj de arbaro. En tiu arbaro, ĝuste ĉe la pasejo, estis floro: alta, nigra kun flavaj makuletoj.

Iuj homoj, kiuj preterpasis por iri al la vilaĝeto nomata Komodoro, aŭ por iri al la alia nomata Kondoro, estis tentataj elŝiri la floron. Tia floro estis sorĉita de malbona sorĉisto, kiu volis detrui la vilaĝetojn por trejni la virojn loĝantajn tie por soldatigi ilin.

“Kiu elŝiros la floron,” diris la malbona sorĉisto, “fariĝos ŝtona statuo senmova.” “Kiam mi kunigos cent virojn; tiam mi faros ilin miaj soldatoj,” pludiris la sorĉisto, ridante funebraĉe.

Li jam havis dudek unu statuojn. Kiam la homoj preterpasis por viziti parencojn aŭ labori, ili vidis la statuojn kaj demandis: “El kie estas ĉi tiuj statuoj?” Oni sciigis, ke tie pasis familio al Komodoro, kaj la patrino eliris la floron kaj fa-

riĝis statuo. Tiam la patro kun la tri infanoj ekkuris rapide al Komodoro por rakonti al la loka radio, kiel la homoj fariĝis statuoj. Kaj la radiistoj disaŭdigis al la du vilaĝetoj: “Atentu! Ne eltiru la floron kun la jenaj karakterizaĵoj: alta, nigra kun flavaj makuletoj, alie oni fariĝos statuoj.”

Tiam la homoj de ambaŭ vilaĝetoj vizitis bonan sorĉistinon, kaj ŝi diris: “Por senefikigi la sorĉon, oni devas havi du blankajn muŝojn kaj unu kvarfolian meliloton.”

Kaj sabate ĉiuj homoj de ambaŭ vilaĝetoj serĉadis blankajn muŝojn kaj meliloton. Kiu trovos ilin, tiu gajnos unu sakon da oraj moneroj kiel premion.

Venis al Komodoro juna sinjorino serĉanta laboron, kun siaj du filetoj. Ili estis malriĉaj. La sinjorino trovis nenion en Komodoro kaj tial ŝi decidis iri al Kondoro. Preterpasante, ŝi vidis homojn en la arbaro kaj demandis ilin: “Kion vi faras?”



Tiam knabino respondis al ŝi: “Ni serĉas blankajn muŝojn kaj meliloton kvarfolian.” La virino diris: “Estas malfacile, ke vi trovos tion, kion vi serĉas, sed bone, mi helpos vin.” Dirinte tion, ŝi kaj ŝiaj infanetoj serĉis kaj trovis la deziratajn aferojn, ne sciante, ke ŝi jam gajnis sakon da oraĵoj.

Kaj la homoj de la du vilaĝetoj donis al ŝi la premion. Tiam ŝi kaj ŝiaj filetoj ekdancis pro ĝojo kaj feliĉo, kaj la sinjorino ekkriis: “Mi ne laboros; mi loĝos kun miaj filetoj ĉi tie!”

La vilaĝanoj portis la blankajn muŝojn kaj la meliloton al la bona sorĉistino, kaj ŝi malsorĉis la statuojn, kiuj refariĝis normalaj personoj kiel antaŭe kaj la vilaĝanoj vivadis feliĉe kaj kontente. ■

(Daŭrigo de p. 12)

por direkti la malpermesadon de falsaj medikamentoj. La grupo konsistas el juĝistoj, policistoj, kuracistoj, teknikistoj kaj oficistoj de industri-komercaj administracioj. La ŝtataj instancoj prenis seriĝon da kuraĝaj rimedoj, nuligis multajn prilaborejojn de falsaj medikamentoj kaj reprenis licencilon de iuj vendistoj. La juĝejo eĉ kondamnis iujn gravajn krimulojn al morto. Ĝis hodiaŭ en la tuta Ĉinio oni jam malkovris 17 000 kazojn, kiuj rilatas 90 specojn de falsaj medikamentoj en valoro de 300

miliono da juanoj.

Aliflanke la ŝtato decidis ellabori koncernajn leĝojn por monopoligi la vendadon de medikamentoj por kiel eble plej baldaŭ starigi rigoran kaj hermetikan cirklan sistemon, ampleksantan la vendadon po-grandan kaj podetalan de la medikamentoj. De julio, 1991, la ŝtato monopoligis vendadon de medikamentoj en Anyang de Henan, Interna Mongolio, Linxia de Gansu kaj Mianyang de Sichuan kaj nun faras aktivan preparon por monopoligi la vendadon de medikamentoj en la tuta lando. ■



S-ro Yang Jieming

WEN QIAN:

# Strebado de ĉina komponisto

**L**A ĉina nacia muziko estas tre vasta sfero. Estas senlima la strebado de Yang Jieming (Jang Ĝjeming), komponisto de ĉina nacia muziko. Oni ofte vidas, ke li meditas kun mallevita kapo, kvazaŭ ion serĉante.

Li sin okupis pri muziko pli ol 40 jarojn. Li estas kompetenta pri muzika arto kaj lerta en verkado de ĉinaj muzikaĵoj. Li estas unuaklasa direktisto de la Centra Ensemblo de Pekino kaj fruktodona komponisto de ĉinaj naciaj muzikaĵoj. Li estis membro de ĥoro kaj lernis ludon de trikordo ĉe eminenta muzikisto, studis tri jarojn en la fakultato de komponado de la Centra Konservatorio en Pekino, la plej alta muzika lernejo en Ĉinio, kaj funkciis kiel direktisto por simfonioj, naciaj muzikaĵoj, ĥoroj kaj baletoj en la Centra Ensemblo kaj Ensemblo de la provinco Shaanxi (Ŝenŝji). En 1956 lia verko "En Nia Loĝloko" estis premiita kiel eminenta verko en konkurso de komponado en la Centra Konservatorio, la plej alta muzika lernejo de Ĉinio. Poste li verkis multajn voĉmuzikaĵojn kaj instrumentajn muzikaĵojn. En la 80-aj jaroj liaj verkoj estis pli maturaj, pli perfektaj kaj elvokivaj. En 1983 lia biva sonato "Nova Verda Talio" gajnis premion de eminenta muzikaĵo de

Unesko kaj la duagradan premion en la Tria Tutlanda Konkurso de Muzikaj Verkoj. Kaj pli poste li verkis muzikaĵojn por la grandiozaj kanto-dancoj "Wang Zhaojun ĉe la Granda Muro" kaj "La Epopoj de Tang- kaj Song-dinastioj". Per tio li kontribuis al la disvolvigo de la nacia muziko de Ĉinio.

Yang Jieming profunde studis la klasikan ĉinan muzikon kaj serioze legis klasikajn poemojn kaj literaturaĵojn por akiri pli da scioj. Li strebas al eleganteco kaj populareco de verkoj kaj plezurigo por aŭskultantoj.

Yang Jieming estas energia kaj pacienca. Al sia komponado li ĉiam donas plenan atenton. Foje, post kiam li finis komponadon por iu televida filmo, li subite rimarkis, ke pasantoj sur strato jam portas printempajn vestojn, sed li ankoraŭ la vintrajn.

Komponado estas tre peniga. Ĉiam, kiam li plenumis grandan verkon, li povas sin malstreĉi kaj bone ripozi.

"Inspiro devenas de diligenteco," diris Yang Jieming. Ĉe matena krepusko aŭ antaŭ endormiĝo inspiro venas nerimarkite. Sekve li tuj ellitiĝas por fari notojn. Ordinare li ĉiam kunportas paperon kaj plumon por uzo en ajna tempo. Li havas trezoron — materialojn aperigitajn en diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj kolek-

titajn de li en dikan kajeron. Iuj el tiuj materialoj iam helpis lian verkadon.

Ne estas hazarde, ke Yang Jieming iris sur la muzikan vojon.


En 1931 li naskiĝis en la urbo Qiqihar (Ĉjiĉjihar) de Heilongjiang (Hejlongĝjang)-provinco. Li ekamis muzikon en sia infaneco. 15-jara, li lernis en muzika kurso. 17-jara, li aliĝis al la Nordorienta Muzika Laborgrupo kaj fariĝis muzika laboranto.

En 1953 kiel membro de la Ĉina Junulara Arta Trupo li turneis en Sovetunio, Germanio kaj Rumanio. Lia kontaktiĝo kun alilandaj kolegoj sentigis al li, ke li devas lerni plu por la muzika laboro. Reveninte la hejmlandon, li studis tri jarojn en la Centra Konservatorio en Pekino.

Poste li laboris en Shaanxi pli ol 20 jarojn. En longa tempo li studis la historion de la ĉina nacia kulturo, konis kutimojn kaj morojn de diversaj lokoj kaj legis multe da libroj. Tio metis solidan bazon por lia verkado.

Rememorante la pasintecon, li diris: "La vivo profundigis mian penson kaj mi ekkomprenis la filozofion de la homa vivo. Ĝojinde estas, ke mi neniam forlasis muzikon. Mia plej granda feliĉo estas, ke mi havas terenon kombini ar-





S-ro Yang Jieming en direktado de junulara orkestro

ton kun praktiko." Li nenion postulas kun plumo kaj taktobastono en la mano. Krom muziko, neniuj gajno aŭ perdo estas grava por li.

En sufiĉe longa tempo la labor-kondiĉoj de Yang Jieming estas malbonaj. Lia laborejo kovras nur 7 kvadratajn metrojn. En la domo staras tablo ĉe fenestro kaj kontraŭ ĝi — malnova piano. La interspaco estas malgranda. Sur la tablo kuŝas dikaj muzikaj libroj

kaj paperoj kun liniaroj. La murŝranko apud la pordo plenas de libroj. La domo estas tre mal-luma. Tio estas loko, kie li diligente laboras super komponaĵoj.

La edzino de Yang Jieming, bela kaj grandanima, estis aktorino de la ĥoro de la Centra Ensemblo. Ŝi jam emeritiĝis kaj tutforte subtenas la laboron de la edzo. Oni ofte vidas, ke ŝi sekigas vestojn sub la suno. Ĉu ŝi aĉetas le-

gomojn, ĉu ŝi kuiras ion, ĉion ŝi bone faras. Ŝi estas ne nur talenta dommastrino, sed ankaŭ la unua aŭskultanto de la verkoj de la edzo. En la verkoj de la komponisto estas ankaŭ ŝia kontribuo.

Pri sia edzo ŝi diris: "Li ne fumas nek drinkas. Li trinkas teon, ŝatas naĝon kaj ŝakludon kaj amas rigardi konkurson de pilkludo. Li estas studema. Kiam li ion komponas, li fariĝas kvazaŭ surda. Kiam li estas laca pro longa verkado, mi akompanas lin en promenado..." Edzino konas edzon pli bone ol la aliaj. Ŝiaj simplaj vortoj plenas de profunda amo.

Li ridis kun ĝojo kaj memfido.

Eble liaj denaska saĝo, fervoro, obstineco kaj diligenteco igis lin ĉiam juna.


Pri la estonteco li diris, ke li daŭre komponos naciajn muzikaĵojn kaj faros studajn verkojn. Lia sola deziro estas disvolvi la eminentan tradicion kulture arton de sia nacio kaj krei pli da bonaj verkoj. ■

## KARIKATURO



## Solvoj por infanaj enigmoj

1. lampiro
2. libelo
3. abelo
4. altosalto
5. korbopilko
6. nokta ĉielo
7. luno



HOU JUELIANG:

# Gajaj makakoj

Makako petas manĝaĵon.

**A**TINGINTE la urbon Jiyuan (Ĝijjūan) en la meza baseno de la Flava Rivero post longa vojaĝo, mi laciĝis kaj deziris malstreĉi min en amuziĝo.

Jen venis la ŝanco: partopreninte la Kratagan Festivalon en Jiyuan-urbo, mi veturis al Wulongkou, fama rezervejo kaj paradizo de makakoj.

Elirinte el la urbo, nia aŭto eniris en la montaran regionon de Taihang. La aŭto suprenveturis laŭ la spirala montvojo. Tra la aŭtaj fenestroj mi vidis, ke malproksime staras sennombraj kalkrokaj montpintoj blankaj kiel neĝ-kovritaj krestoj, proksime ĉie sur la montoj kreskas verdaj arbedoj. Tie la naturaj vivkondiĉoj estas idealaj por makakoj.

Kiam la aŭto haltis sur monttalo, mi tuj elsaltis el ĝi. Akraj krioj de makakoj aŭdiĝis de malproksime. En la loko, kie haltis nia aŭto, kelkaj virinoj vendantaj ternuksojn afable diris al mi: "Jen ŝatata man-

ĝaĵo de makakoj. Bonvolu aĉeti, sinjoro." Vere, oni devas doni iom da donacoj al makakoj je la renkontiĝo. Do, la vizitantoj aĉetis konkure la grajnoj de ternuksoj.

Kun paketo da ternuksoj en mano, ni supreniris laŭ la zigzaga montvojo. Post nelonge, ni venis al la montpiedo, kie vivas makakaroj. Ĉi tie sidas administrejo de la rezervejo, en kaj el kies domoj kaj kortoj makakoj libere iras. Sur la loko ĉie vidiĝas multaj makakoj. Ili kuraĝe iris al la vizitantoj, fiksante siajn rigardojn sur paketoj en niaj manoj.

Mi elprenis la grajnoj kaj jetis ilin sur la teron unu post alia. Tre ĝojaj makakoj konkure kaptis ilin. Kiam la grajnoj falis surteren, ili tuj forprenis, rapide metis la grajnoj en la buŝon kaj manĝis, elbuŝiginte la ŝelon. Ili manĝis eĉ pli lerte ol la homoj. Tiam, iu alia proponis al mi: "Ĵetu la grajnoj al la ĉielo!" Mi do faris laŭ lia propono, sed neatendite, makakoj tuj kaptis la grajnoj kaj metis ilin en

la buŝon antaŭ ol la grajnoj falis surteren. Mi senĉese jetis al la ĉielo, makakoj haste saltadis kaj vekis ridojn ĉe la vizitantoj. Tiam, iu proponis al mi: "Metu ternuksojn sur manplaton kaj lasu la bestojn mem preni." Mi malkuraĝis, timante, ke ungoj de makakoj vundos mian manon. Fakte, ili ne vundas homojn. Kolektinte mian kuraĝon, mi metis ternukson sur mian polmon kaj etendis la manon, tuj iu makako alsaltis kaj forprenis la frukton de sur mia mano. Kiam la makako tuŝis min per sia maneto, mi sentis, ke ĝi estas tre mola anstataŭ akra. Tiam iu apudstaranta vizitanto kaptis manon de la makako. Ekster nia atendo, la makako tuj koleriĝis, opiniante, ke li volas vundi ĝin. "Frap" ĝi forte frapis lin per la alia mano. Tio vekis ridegon ĉe la vizitantoj.

Mia akompananto, fraŭlino Luo Li, tre ŝatis makakidon malgrandan kiel sciuro. Ŝi prenis ĝin de sur la tero kaj tenis ĝin sur sia manplato, sed tute ekster ŝia atendo, tio koler-

igis la patrino de la makakido. La maljuna makakino alkuris, ĉirkaŭbrakis gambon de fraŭlino Luo kaj forte mordis ŝin. Jen brava agado de la makakino por protekti ĝian idon. Simila afero okazis ankaŭ ĉe s-ro Kong. La supre menciita petolema makakido subite saltis sur la maldekstran brakon de s-ro Kong, kies elektrona horloĝo interesis ĝin, kaj ĝi senfine pririgardis. Tion vidinte, ĝia patrino alsaltis mordi la manon de s-ro Kong kaj forkaptis sian idon. La vizitantoj ne volis vundi makakojn, sed la lastaj estis tre singardemaj kontraŭ la homoj. Jen miskomprenoj okazis unu post alia.

Sen miskompreno la makakoj estas ĉiam amikaj al la vizitantoj. Kiam ni fotis nin kune kun ili, ili estis obeemaj, jen en niaj brakoj, jen sur niaj ŝultroj kaj kapo. Aŭdinte klakon de la momenta obturilo de fotoaparato, ili tuj resaltis surteren, kvazaŭ ili sciis, ke oni finis la foton. Kiel saĝaj ili estas!

La facilmovaj makakoj estas specio de simioj. Ili vivas grupe kaj manĝas diversajn fruktojn kaj vegetalojn. Ilia supra korp parto estas bruna kaj la malsupra — oranĝa. Kun vosto mallonga, vizaĝo ruĝeta kaj frunto ne tre elstara, ili ĉiam plaĉas al la vizitantoj. La loka registaro donas grandan atenton al protektado de la makakoj de Taihangmontaro kaj fondis la rezervejon.

Ĉi tie estis iu maljuna laboristo, kiu amikiĝis kun makakoj por 30 jaroj. Li bone scias iliajn vivkutimojn kaj indas je lerta makakodresisto. Por gajigi la vizitantojn, li fajfis al la monto. Aŭdinte la fajfon, makakoj konkure saltis malsupren. La maljunulo diris la mi:

“En Taihang-montaro vivas pli ol 2 000 makakoj dividitaj en 9 grupojn. El ili 800 estis jam malsovaĝigitaj.”

Li informis al mi, ke ĉiu grupo havas sian neinvadeblan teron kun klara limo. Fingre montrante al mi la montpinton, sur kiu staras virmakako, la maljunulo daŭrigis:

“Jen makako, ĝi estas landlima gardanto sendita de makakoreĝo.



Turistoj kaj makakoj en la rezervejo

Kiam aliaj grupoj entrudiĝas en ilian teron, ĝi krie alarmas al la reĝo por batali kontraŭ la invadantoj. Ĉiu grupo havas sian propran reĝon.”

“Kiel oni povas scii, kiu estas reĝo?” mi demandis.

“La reĝo estas pli granda ol aliaj makakoj. Ĝi iras arogante kun la levita vosto, kaj aliaj timas ĝin kaj iras kun la vosto subtrita.” La maljunulo humure daŭrigis, ke samkiel elektokampanjo en la homa socio, makakoj konkuras por la reĝeco ĉiam post kvar jaroj. Virmakakoj kolektiĝas kaj interbatalas. Kiu venkis la aliajn, tiu fariĝis reĝo. Post kruelaj bataloj aŭ la reĝo daŭrigas sian reĝadon aŭ iu nova reĝo surtroniĝas.

“Kiel vivas la eksreĝo?” iu demandis.

La maljunulo skuis la kapon kaj veis: “Do, tiam malfeliĉa ĝi fariĝas. Estante reĝo, ĝi feroce traktis la aliajn. Post kiam ĝi perdis sian reĝecon, aliaj makakoj ne plu timas ĝin kaj kune venĝas sin al ĝi. Ĝi do devigite fuĝas aliloken kun siaj ed-

zinoj.” Je tio, la maljunulo kondukis nin antaŭ iun domon, en kiu estis 5 makakoj. Li sciigis nin, ke la plej granda el ili estas la eksreĝo kaj la aliaj, ĝiaj edzinoj. Li humure klarigis al ni, ke tiu makakino milde apoganta sin sur sia edzo estas la plej juna kromedzino favorata de la eksreĝo. Nun ĝi sola akompanas tage kaj nokte sian edzon, dum la aliaj ne tiel ŝatataj devas sin deteni de ĝi; la makakino, kiu staras plej malproksime de ĝi, estas ĝia unua edzino. “Samkiel iuj viroj, ankaŭ la makakoreĝo amas novan edzinon kaj tediĝas de la malnova,” ŝercis la maljunulo.

“Kial oni fermis ilin kune?”

La maljunulo respondis kun rideto: “La reĝo ne permesas al siaj edzinoj kunesti kun aliaj, kvankam ĝi ne plu amas ilin.”

Mi estis kontenta je la makakoj kaj rakontoj de la maljunulo. Mi forgesis lacon kaj multe ĝojigis. Kiel mi diziras refoje viziti tiujn gajajn kaj amindajn makakojn! ■

## Ĉinaj proverboj

Kiel rivero, ankaŭ libroj portas ĉiujn al la celoj.

Libroj sennombraj, vojo senfina.

Diligento kondukas al monto de libroj, penado direktas al maro de scioj.

Nemaĝado malsatigas, nelegado malsaĝigas.

Ripari domon dum serena tago, lerni dum juna aĝo.

Sukcesigas lernado plus demandado.

Diligenta lernado progresigas, samkiel pena ŝipado kontraŭ fluo.

Unutaga legado rekompenas, unutaga ripozo ne rikoltigas por kelka tempo.

Fera stango fariĝas pinglo post longa polurado.

Tempo mezuriĝas per oro, sed ne aĉeteblas per oro.

## Infanaj enigmoj

Ĝi ĉiam kun lanterno  
Ripozas en la tago  
Kaj flugas en la nokto.

(Nomo de insekto)

Eta aviadilo  
Kun gazaj flugiloj  
klopodas tie kaj ĉi tie  
Por kapti fiinsektojn.

(Nomo de insekto)

Knabino malgranda,  
Flave vestita.  
Kiu ŝin ofendas,  
Tiun ŝi tuj pikas.

(Nomo de insekto)

Du postamentoj dise staras,  
Unu lato horizontalas.

Venkitojn ili forpuŝas

Bravuloj post ili fieras. (Nomo de sportbranĉo)

Kuras dek homoj,  
Por kapti melonon  
Kaj pene ĵetas ĝin

En la senfundan korbon. (Nomo de sportbranĉo)

Sur vasta tabulo

Estas nekalkuleblaj ŝakpecoj.


Oni ĉiam ĝoje ĝin rigardas

Sed ludi sur ĝi ili ne povas

(Nomo de astronomia estaĵo)

(Solvaj troveblaj en ĉi numero)

## En montvilaĝo (Karikaturaj)



Plej granda — mondonaco por funkciigi lernejon

Plej bela — lernejo en vilaĝo

Plej respektata — kara instruistino

Plej ĝojiga — avizo pri studentigo

# Kolektiva amuzajo en la 15-a de la unua monato

Teksto de SHI YONGGANG kaj LU ZHONGMIN

Fotoj de LU ZHONGMIN

**L**Aŭ la ĉina moro, la 1-a de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro estas la Nova Jaro, alinome la Printempa Festo kaj la 15-a de la sama monato — la Lanterna Festo.

La Printempa Festo estas la plej granda kaj solena por la ĉinoj. En la kamparo, oni komencas prepari la feston ekde la lasta monato de la antaŭa jaro, ĉar tiam la kamplaboro estas malmulta. Laŭ la malnova kutimo, oni nomis la 23-an de la 12-a monato Malgranda Festo kaj la 30-an de la 12-a monato oni pasis la jarfinan nokton sen dormi. La 1-an de la unua monato t.e. en la Printempa Festo, oni kultis al prapatroj; parencoj kaj amikoj vizitis unu alian por reciproki festosaluton, kaj la 5-an oni manĝis *ĝjaŭzi*-ojn. En malsamaj lokoj de Ĉinio oni celebris la feston per similaj aktivadoj laŭ siaj propraj kutimoj kaj lokaj moroj.

La Lanterna Festo de la 15-a de la unua monato puŝis la celebradon al la kulmino. Tiun tagon oni sinsekve elhejmiĝis por ĝui la kolektivajn amuzojn, la plej gajan aktivadon en la tuta jaro.

Antikve oni okazigis kolektivajn amuzojn por forigi fiaĵojn kaj bonvenigi diojn. Nuntempe popolanoj manifestas en tiu tago siajn proprajn amuzojn. Tiuvespere plena luno alte pendas sur la ĉielo, konsiderita de antikve kiel favora aŭspicio, simbolas feliĉon. En tiu tago la familianoj kolektiĝis kaj

kultis al la ĉielo por peti riĉan rikolton. Legendo diras, ke en la regperiodo de la Imperiestro Wudi (156 a.K. — 87 p.K.) de Handinastio, palacaj knabinoj ofte ploris tiun tagon pro tio, ke ili ne povis renkontiĝi kun siaj familianoj. Por ĝojigi ilin, la palaca aŭguristo Dongfang Shuo elpensis artifikon, diskonigante, ke la 16-an de la unua monato la Fajra Dio

**bruligos** Chang'an, la ĉefurbon de Handinastio, laŭ la ordono de la Ĉiela Imperiestro. Dongfang proponis al la Imperiestro Wudi, ke oni oferu farunbulojn dolĉe farĉitajn el glueca rizo kuiritajn en bolanta akvo, kiujn la Fajra Dio ŝatas, pendigu ruĝajn lanternojn kaj bruligu krakfajraĵojn por trompi la Ĉielan Imperiestron kaj eviti katastrofon. Li proponis ankaŭ al la imperiestro, ke tiu permesu al la imperiestraj kromedzinoj,

palacaj knabinoj kaj ĉiuj korteganoj rigardi lanternojn sur stratoj. Tiele, manĝi la supre diritajn farunbulojn kaj pendigi buntajn lanternojn fariĝis moro kaj festa aktivado ĝis hodiaŭ. Jen la Lanterna Festo.

Ĉi-sube mi konigu al vi, niaj karaj legantoj, la kolektivajn amuzojn en la 15-a de la unua monato

Partoprenantoj de amuza aktivado





Transiro de tablo

okazintan en la urbo Houma, Shanxi-provinco.

Tiun tagon, amuzaj grupoj el 6 600 kamparanoj, laboristoj, oficistoj kaj lernejanoj sinsekve aperis sur stratoj je la tagiĝo. Diverskoloraj vestoj, ĉaroj, flagoj kaj floroj formis varman atmosferon. La spektantoj venis ĉi tien el diversaj lokoj de la urbo por ĝui la grandan spektaklon.

Je la 10-a, komenciĝis la ludoj de diversaj gongoj, tamburoj, iroj sur stilzoj, *jangge*-dancoj, ludoj de surtera boato, leonaj dancoj k.a. La ludantoj iris kantante kaj dancante. Laŭ kutimo, ili prezentis lu-

dojn post mallonga irado. Tion ripetinte kelkfoje, ili eniris finfine en la centran ludejon por plene montri sian lertecon.

El ĉiuj prezentadoj, la ludoj de gongoj kaj tamburoj estis la plej ĉarmaj. Unue prezentigis impona ludo de Linfen-aj gongoj kaj tamburoj. La tamburistoj en vestoj de antikvaj militistoj svingis tamburbatilojn, dancante kun entuziasmo. La sceno estis impona kaj ekscita. La gvidanto de la ludo de tamburinoj estis 70-jara maljunulo. Radiante de ĝojo, li kun rideto lerte frapis tamburinetojn pendantajn sur la kapo kaj ĉe la talio. Kompare kun tiu de Linfen-a tam-

burado, ĝi estas pli delikata kaj bela. En tambura bruo, dekoj da ĉevaloj kirasitaj kiel antikvaj militĉevaloj eniris en la ludkampon, tirante militĉaron. Sur ĝi flagoj flirtis, militistoj energie batis la gigantan tamburon. La sceno estis impona. Kiel hejmloko de gongoj kaj tamburoj, Shanxi-provinco okazigis en 1991 Internacian Festivalon de Gongoj kaj Tamburoj. Sole shanxianoj prezentis pli ol 10 ludojn de gongoj kaj tamburoj.

Kiel en ĉiuj aliaj lokoj, ankaŭ en Shanxi ne mankigeblas iroj sur stilzoj kaj *jangge*-dancoj dum la festado.


Alivestinte sin kiel personoj en diversaj tradiciaj teatraĵoj, la stilzirantoj iris per lignaj stilzoj altaj je 30-100 cm. La stilzirado havas du specojn, t.e. la modera kaj drasta. La modera irantoj marŝas kantante kun simplaj dancmovoj, dum la drastaj saltas trans altajn tablojn, formas homajn piramidojn, plene etendas siajn kruojn kaj aliajn malfacilajn movojn. La Houma-a stilzirado distingiĝas jene: Ĉiu stilzo altas ĉ. unu metron, kaj plie 2-8 ludantoj kunligis siajn

pedojn sur du lignaj bastonoj.

*Jangge*-danco, unu el la tipaj popolaj dancoj de norda Ĉinio, havas multajn specojn. La Baidian-a *jangge*-danco havas siajn proprajn trajtojn. Kiu tenas ombrelon, tiu gvidas la *jangge*-dancantojn. Laŭ direktado de la ombrelo, la dancantoj senĉese ŝanĝis siajn movojn.


Vespere, ĉie lumis buntaj lanternoj. La kolektiva amuzajo daŭris ĝis meznokto.

Post la Lanterna Festo, la celebraj aktivadoj finiĝis. Kun ĝojo oni ekpreparis terkulturon kaj aliajn laborojn. ■



Procesio de tamburantoj

Prezentado de "Novedzino Survoje al la Hejmo de Siaj Gepatroj"



Maljunulo tamburanta





Inaŭguro de Huaxia-banko

### EKONOMIO

- Huaxia (Hŭaŝja)-banko fondita de la Ĉefurba Fer-stala Kompanio ekfunkciis antaŭ nelonge. Ĝi estas la unua banko en Ĉinio fondita de industria entrepreno.


La nomita kompanio estas entrepreno, kiu plej frue provis reformadon en Ĉinio. Nun ĝi fariĝis transfaka, transregiona kaj translanda entrepreno. Julie de 1992 la ŝtato donis al ĝi ne nur la rajton mem decidi investadon kaj komercadon kun aliaj landoj, sed ankaŭ la rajton de kapitalo-cirkulado, t.e., ĝi rajtas starigi sian propran bankon kaj entrepreni financon aferon laŭ internacia konvencio. La fondiĝo de Huaxia-banko havas gravan signifon por akceli la reformadon de la ĉina financa sistemo kaj disvolvi kapitalan merkaton.

- En 1992 la totala nacia produktovalorado de Ĉinio atingis 2 100 miliardojn da juanoj (laŭ la fiksa prezo de 1990), je 12.1% pli multe ol tiu en 1991. Tio markis, ke la ĉina nacia ekonomio transiris de malrapida al rapida kreskado.

- La duaperioda konstruo de la elektrizita Datong-Qinhuangdao(Ĉinhŭangdaŭ)-a Fervojo estas transdonita al uzado. La dutraka fervojo, sur kiu iras 10 000-tuna vagonaro, komenciĝas de Datong, Shanxi(Ŝanŝji)-provinco okcidente kaj finiĝas ĉe Qinhuangdao, Hebei-provinco oriente.


Ĝi estas alia grava fervojo por transporti karbon de okcidente orienten. En la 4 jaroj post ĝia ekfunkciado pere de la unuaperioda konstruo oni transportis sume 130 milionojn da tunoj da karbo, kun rimarkindaj profitoj.

- La aktivado "Vojaĝo por ekzameni varkvaliton", komencita printempe de 1992, estis ar-



La transporta raketo Changzheng n-ro 2-E

anĝita kune de la ĉina gazetaro kaj iuj registaraj departementoj, kun la celo solvi la kvalitan problemon ekzistantan en la varproduktado de Ĉinio. Dum la aktivado multaj malbonkvalitaj produktaĵoj estis malkovritaj en televido aŭ gazeto, kio estis bonvenigata de la publiko. Samtempe kun tio, Ĉinio starigis 2 399 asociojn de konsumantoj ĉe gubernia kaj pli altaj niveloj. Tiuj asocioj, kun servo al la



Oni sukcese elfaris superkomputeron.

konsumantoj kiel sia principo, faris multajn laborojn en la traktado de akuzoj far konsumantoj kaj helpado al ili en solvado de malfacilaĵoj.

- Decembre de 1992, la dua ĉina magazeno "Ĉina Komercurbo", sidanta en la centro de Bukaresto, malfermiĝis al klientoj. La magazeno estas investita kune de la Yajing(Jaĝing)-a Internacia Komerca Kompanio de Wuhan, la Orienteŭropa Industria Disvolva Limigita Kompanio de Hongkong kaj iu rumano. En la magazeno kun areo de 240 kvadrataj metroj vendiĝas ĉinaj vestoj, artaĵoj, ludiloj, ĉiutagaj necesaĵoj k.a. La unua ĉina maga-



zeno "Granda Muro" ĉiam prosperas de sia ekfunkciado en junio de la jaro.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Je la 19-a kaj dudek minutoj de la 21-a de decembro 1992, en la satelita lanĉejo Xichang (Ŝjĉang), Ĉinio, la transporta raketo "Changzheng n-ro 2-E" sukcese sendis la duan sateliton por Aŭstralio en la spacon.

Nun Ĉinio bone plenumis la kontrakton pri lanĉado de 2 telekomunikaj satelitoj por Aŭstralio.

● La Altenergia Fizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj ricevis antaŭ nelonge masajn datenojn de korusklo  $\tau$ , kio vekis egan eĥon en la internaciaj rondoj de altenergiaj fizikistoj. Sciencistoj opinias, ke per tio oni akiris la plej precizajn masajn datenojn de korusklo  $\tau$  kaj faris grandan paŝon antaŭen por solvi la kontraŭdiron inter la vivdaŭro kaj maso de korusklo  $\tau$  kaj la universaleco de la malforta interago inter leptonoj. Li Zhengdao, gajninto de Nobelo-premio, diris: "Tio estas unu el la plej gravaj eksperimentaj fruktoj en la kampo de altenergia fiziko en la lasta tempo de la mondo."

● La superkomputero "Lakta Vojo II", kiu kapblas fari miliardon da fojoj da operacioj sekunde, estis farita de la Komputera Instituto sub la Universitato de Nacidefendaj Sciencoj kaj Teknikoj de Ĉinio kaj ekspertizita de la ŝtato en novembro 1992. La naskiĝo de la komputero plenigis la blankon de universala paralela superkomputero de Ĉinio kaj mallongigis la distancon inter Ĉinio kaj aliaj landoj tiuflanke.

La superkomputero taŭgas por esti ĉefmaŝino por superkomputera centro, kaj ankaŭ por esti traktilo por granda daten-proceza centro.

● La Ĉina Teknika Instituto pri Transporta Raketo lastatempe unuafoje sukcesis elfari navigacian lokalizilon por satelitoj, kun ĉefaj teknikaj normoj en la 90-aj jaroj de la mondo. Ĝi kun malgranda volumeno pezas nur 0.8 kg.

### KULTURO

● La Orienta Televidstacio de Ŝanhajo fondiĝis antaŭ nelonge en la ekspluata regiono Pudong. Tio rompis la aranĝon, ke en Ĉinio "ĉiu urbo havas unu televidstacion", kaj aperis la nova situacio, en kiu pluraj televidstacioj de Ŝanhajo kune ekzistas.

● La totala produktovalorero de industrio kaj agrikulturo de Wuxi-gubernio ĉe la Delto de Yangzi-rivero superis 30 miliardojn da juanoj en

1992 kaj tial ĝi fariĝis unu el la gubernioj de Ĉinio, kie ekonomio plej rapide disvolviĝas.

Por sin adapti al ekonomia disvolviĝo, la gubernio dediĉis sian atenton al kulturado de fakuloj por alt-teknikaj industrioj kaj por eksportata ekonomio. De oktobro 1992, helpate de 14 altlernejoj kaj kolegioj, kiaj Suzhou(Suĝoŭ)-Universitato kaj Nankina Universitato, ĝi starigis 36 universitatajn kaj kolegiajn kursojn kun 1 238 kamparanoj-lernantoj. Nun funkcias 36 kursoj de 20 fakoj, kiaj industria aŭtomatizo, elektromaŝina integriĝo, ekstera komerco, angla lingvo por ekstera komerco, internacia merkato kaj aplikado de komputero.

● Koncerna materialo montras, ke de 1990 ĝis septembro 1992 Ĉinio invitis sume 80 000 alilandajn specialistojn, kiuj laboris en la organizaĵoj kultura, eduka, novaĵa, eldona k.a. Tio markis, ke Ĉinio rapide progresis en la enkonduko de alilandaj intelektoj.

### ARKEOLOGIO

● Esplorantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj elfosis antaŭ nelonge ĉe Chengjiang (Ĉengĝjang) de Yunnan-provinco fosilieron de grandaj karnovoraj bestoj, kiuj vivis antaŭ 570 milionoj da jaroj. Ili longis 0.5-1.8 m, kun plata korpo, sen piedoj. Kun 11 paroj da naĝiloj ili bone naĝis kaj kun paro da flekseblaj kaptiloj antaŭ la kapo ili povis kapti beston kaj dismembri ĝin. La mondaj akademiaj rondoj opinias, ke tiu grava malkovro nuligis la dubon, ĉu ekzistis karnovoraj bestoj sur la terĝlobo antaŭ 500 milionoj da jaroj.

### MEDIPROTEKTADO

● Nun en Ĉinio estas sume 708 rezervejoj kun areo de 569 000 kvadrataj kilometroj, i.a., la tera areo konsistigas 5.6% de la totala areo de la lando. Inter la rezervejoj estas 61 protektataj de la ŝtato, 318 de provincoj kaj la ceteraj de distriktoj, urboj kaj gubernioj.

● 10 sovaĝaj mongolaj ĉevaloj arte reproduktitaj en Britio jam forlasis la landon kaj revenis sian hejmlokon — la rezervejon en la dezerto Anxi (Anŝji) de la Interna Mongolio de Ĉinio. Tio estas konsistiga parto de la plano, ke Ĉinio revenigos hejmen tiaspecajn bestojn malaperintajn jam antaŭ 30 jaroj en la Interna Mongolio. Laŭ la interkonsento, la plano revenigi sovaĝajn mongolajn ĉevalojn en la naturon estos plenumita en la daŭro de 3 jaroj. Ĉiujare Britio sendos 10 sovaĝajn ĉevalojn al Ĉinio.

### EKONOMIAJ NORMOJ DE ĈINIO SUR LA UNUJAJ LOKOJ DE LA MONDO

14 jarojn post la ekpraktiko de reformo kaj por-domalfermo, la sintezaj fortoj de la ĉina ekonomio kaj iuj ekonomiaj normoj estas en la unuaj lokoj de la mondo kaj la lokoj de la kvantoj de la ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj evidente leviĝis supren. Tiu konkludo estis farita de la Ĉina Statistika Buroo post ĉiufanka komparo.

Laŭ la tarifo de la Monda Banko en la Raporto pri la Monda Disvolviĝo en 1992, en 1990, la totala enlanda produktovaloru de Ĉinio okupis la naŭan lokon en la mondo, post Usono, Japanio, Germanio, Francio, Italio, Britio, Kanado kaj Sovetunio. La kvantoj de la ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj estis sur la unuaj lokoj de la mondo. Interalie, la produktokvantoj de cemento, kotona ŝtofo, greno, kotono, oleo, viando kaj karbo okupis la unuan lokon en la mondo respektive, antaŭe la duan aŭ trian; la produktokvanto de elektro kaj tiu de nafto okupis la kvaran kaj kvinan lokojn respektive, antaŭe la sepan kaj okan; la produktokvanto de ŝtalo leviĝis de la kvina al la kvara loko; kaj la kvanto de transportitaj varoj de la sepa al la tria loko. Kontinue malgrandiĝis la diferenco inter la pokapa kvanto de la ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktoj kaj tiu de la mondo. La pokapa produktokvanto de karbo, cemento, greno kaj kotono superis aŭ proksimiĝis al tiu de la mondo. Kun la plifortiĝo de la ekonomiaj fortoj de Ĉinio, scienca esplorado, edukado kaj sanprotektado rapide disvolviĝis. En 1991, la totala nombro de sciencistoj kaj teknikistoj, laborantaj en organizaĵoj de tutpopola posedsistemo, okupis la trian lokon de la mondo; la nombro de lernantoj estis la plej granda en la mondo; la nombro de kuracistoj estis 1 780 000 kaj okupis la unuan lokon en la mondo, kaj la averaĝa nombro de loĝantoj servataj de kuracistoj estis egala al tiu de lando kun meza aŭ supermeza enspezo. La meznombra vivdaŭro de la ĉinoj proksimiĝis al la aĝo de 70 jaroj, pli alta ol tiu de la supre dirita lando.

La vivo de la loĝantaro radikale ŝanĝiĝis. En la lastaj jaroj la ĉiutaga kvanto de manĝaĵaj kalorioj kaj proteino enprenita de la ĉino estis pli alta ol aŭ proksimia al tiuj en la disvolviĝantaj landoj. En 1990, la pokapa kvanto de konsumita greno en Ĉinio estis 238.8 kg, pli multe ol kiom en la disvolviĝantaj landoj (204.2 kg). La pokapa kvanto de konsumitaj ovo, viando kaj vegetalino proksimiĝis al la meznombra kvanto de la mondo, kaj la pokapa kvanto de konsumitaj ŝtofoj estis 10.6 m, egale al la monda meznombra kvanto. La populareco de televidiloj, fotografiloj kaj radioriceviloj atingis tiun de lando kun meza aŭ supermeza enspezo.

### TRI SPECIOJ DE GRANDA PANDO DE ĈINIO

Pri la rara granda pando de Ĉinio, antaŭe oni

opiniis, ke estas nur unu specio de ĝi. Multfoje esploriginte la montaron de norda Hanzhong (Hangong)-regiono de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco, kie vivas grandaj pandoj, sciencistoj trovis, ke estas tri specioj de grandaj pandoj.

La unua estas ordinara pando kun nigraj kaj blankaj makuloj. Tiaj pandoj estas nutrataj en zooj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ili vivas en la ŝtata rezervejo Foping, Sichuan-provinco, kaj konsistigas 80% de la totala nombro.

La dua estas bruna pando. De 1985 ĝis 1991, tri tiaj pandoj estis trovitaj en Foping. La haroj sur la oreloj, orbitoj, okuloj, supra lipo, skapolaj zonoj kaj membroj estas brunaj. Trovinte la unuan tian pandon, fakuloj de la Pekina Universitato laŭdis ĝin la plej bela pando en la mondo. Post esplorado la fakuloj konstatis, ke eble vivas en Foping multaj tiaj pandoj.

La tria estas blanka pando. Novembre de 1990, laborantoj de la rezervejo Foping trovis blankan pandon. Krom la orbitoj kaj malsupra parto de la membroj, la aliaj partoj de la korpo havas sur si blankajn harojn. Oni laŭdis ĝin "la animo de la trezoroj".

### TIBETAJ LAMAOJ HODIAŬ

La templo Zashilunbu kun historio de 540 jaroj estas okcidente de Xigaze, Tibeto. La templo estas unu el la kvar grandaj temploj de la flava sekto de lamaismo, kaj ankaŭ unu el la gravaj historiaj lokoj protektataj de la ŝtato.

Zashilunbu-templo havas pli ol 50 kapelojn kaj tie vivas 700 lamaoj. Inter ili iuj estas grandaĝuloj kaj infanoj ĵus antaŭe enirintaj en la templon.

Kun la disvolviĝo de la socio, la vivo de lamaoj ŝanĝiĝis. Nun modernaj sciencoj kaj teknikoj estas uzataj en la templo. De la lastaj jaroj multaj lamaoj uzas sunenergian fornon, kio faciligas ilian vivon.

En Zashilunbu estas pli ol 6 000 tibetstilaj ĉambroj. Laŭ rango kaj aĝo oni donas al lamaoj ĉambrojn. Iuj ricevas po unu ĉambro, aliaj loĝas kune. La junaj lamaoj, ĵus enirintaj en la templon, vivas en kolektivo. En multaj ĉambroj staras tibettipaj ŝrankoj kun ĉiutagaj bezonaĵoj.

Iuj lamaoj posedas ankaŭ magnetofonojn. Nun ĉiuj lamaoj de Zashilunbu-templo portas brakhorloĝon, kelkaj el ili eĉ havas elektronan kvarcohorloĝon. En la templo estas sume pli ol 400 magnetofonoj kaj radioaparatoj, po du lamaoj havas unu tian aparaton. En 1980, la unua televidilo "National" ekfunkciis tie. Multaj lamaoj diris, ke la socio ne estas fremda por ili, kvankam ili vivas en la templo. Ili diris ankaŭ: "Per modernaj komunikiloj ni konas la ĉirkaŭaĵojn kaj plie la mondon."

# Vojo al la ĉielo

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

**L**A antikva vojo etendiĝas malproksimen...

Pli antaŭe kuŝas Tanggula, la ĉefa montaro de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Ni veturis malproksimen al ĝi, al la nuboj.

Transpasinte Tanggula-montaron, ni eniros Tibeton, la duan hejmlokon de principinoj Wencheng kaj Jincheng.

## TANGGULA-MONTARO

La nomita montaro, imponanta ĉe la centro de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, estas nepre transpasenda baraĵo por iri de

Qinghai al Tibeto.

Veturinte sur la monton, ni vidis nur neĝon. Trovinte nin malesperaj, la vojgvidanto klarigis: "Vi miskomprenis la altebenaĵon. Ĉu ĝi ne estas ebenaĵo sur alta loko?" Jes. Sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kontinuas altaj montoj kaj neĝkovritaj krestoj je pli ol 5 000 m. super la marnivelo. Ili diferencas inter si en la alteco je nur centoj da metroj. Ili situas en la areo de 2.5 milionoj da kvadrataj kilometroj. Jen kial oni diras, ke rigardate de malproksime, la neĝkovritaj montpintoj ligiĝas kun la ĉielo


kaj ĉie vidiĝas ebenejo. Tamen Tanggula-montaro meritas esti reĝo de la montoj, ĉar tie naskiĝis la granda filo de Ĉinio — Yangzi-rivero.

Julie sur Tanggula-montaro ankoraŭ regas malvarmo. Tie neĝ-vento blovas tra la tuta jaro, sekve oni nomas ĝin "fonto de vento kaj neĝo". Ĉe la montpasejo restas nur vojriparista grupo kaj depotejo. Tie viglas gregoj da sovaĝaj poefagoj, kiangoj, tibetaj antilopoj kaj aliaj raraj birdoj kaj bestoj.

La grandaj sovaĝaj poefagoj kun akraj kornoj kaj neĝkovritaj nigraj haroj longaj ĝis la tero aspektas ferocaj kaj timigaj. Ili estas rigardataj kiel simbolo de la altebenaĵo kaj la tibetanoj amas ilin trezoro. Iliaj karno kaj lakto povas servi kiel manĝaĵo, el ilia felo oni povas fari ledon, iliaj haroj estas bona materialo por fari tekstilaĵojn, kaj eĉ ilia longa vosto estas valora ornamaĵo. Sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo vivas du trionoj de la poefagoj de la mondo, tial la loko meritas esti "hejmloko de poefagoj".

Kiangoj tre similas al altaj ĉevaloj. Ili migras arope. Vintre ili sin kaŝas en profunda monto, somere loĝas ĉe lagoj. Ili kuras

## Skemo de la antikva vojo Tangbo



rapide, ofte levas post si nubojn da polvo.

La tibetaj antilopoj estas mirigaj. Se vi perdas la vojon sur la dezerta altebenaĵo, vi devas sekvi la piedsignojn de la antilopoj, ĉar ili estas rutinemaj. Ili ĉiam iras de sudo al nordo somere por "somerumi", kaj vintre revenas de nordo al sudo por generado. Ili ĉiujare ir- kaj reiras sur la fiksa vojo. Se vi vidas stepon, do vi estas en la sudo, se vi trovas sensalan lagon, do vi troviĝas en la nordo.

## NORD-TIBETA NAGQU

Forlasinte la pasejon de Tanggula-montaro kaj veturante laŭ la Qinghai-Tibeta Ŝoseo al la ekstremo de nubo, ni eniris en Tibeton. La unua vizitata loko estis Nagqu (Naĉju), vasta stepo meznombro je 4 700 m. super la marnivelo. Tibetanoj nomas ĝin senhoma loko.

Nagqu situas en frosta zono. Ĝi estas loko maldense loĝata. Tie mankas oksigeno, tamen ĝi estas nepre trapasenda loko sur la Antikva Vojo al Tibeto. En Tang-dinastio, de Xining ĝis la nuna Maizhokunggar de Tubo-regno estis sume 23 poŝtstacioj, kaj Nagqu sin trovis ĝuste sur la vojo. Estis hazarde, ke en la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento, iu generalo de la nova Ĉinio elektis vojon proksiman al la Antikva Vojo al Tibeto kaj konstruigis la 2 100-kilometran Qinghai-Tibetan Ŝoseon, por kiel eble plej rapide transporti materialojn al Lhasa por konstrui Tibeton. Dank' al la vojo, naskiĝis Nagqu, kiu prosperiĝas kaj moderniĝas el sovaĝejo.

En Nagqu ni vizitis ventoeksperimentan domegon, sur kies tegmento instaligiĝis dekoj da ventradoj. Nagqu estas ventofonto. Ĉiujare tie blovas pli-ol-8-grada vento cent tagojn. Oni povas utiligi ventenergien en 6-12 horoj ĉiutage en la tuta jaro. En iuj vilaĝoj oni produktas elektron

per vento.

Ni gastis ĉe iu paŝtista familio. En ties domo lumas kvar elektraj lampoj, oni produktas elektron per malgranda vent-energia generatoro. En lumo la mastro fervore regalis nin per ventosekigita bovaĵo, ripetade dirante: "Manĝante nekuiritan viandon, oni ricevas grandan varmon kaj forton. Ĝi estas pli bongusta ol la kuirita, se vi malrapide maĉas ĝin." Pro alta altitudo tie la bolpunkto estas ĉ. 80°C. Viando estas malfacile bone kuirita per tia akvo. La paŝtistoj buĉas bovojn kaj ŝafojn en vintro, sekigas kaj konservas ilin por manĝi en la tuta jaro. Ĉe adiaŭo, la mastro tuŝis mian vizaĝon per la sia kelkfoje, dirante "cairen" (kun signifo de longa vivo kaj bonfarto). Tie mi aprecis alian moron de tibetanoj.

En Nagqu sin trovas pli ol 300 fontoj, kie la akvo estas pli ol 50°C. La termofontoj kaj neĝkovritaj montoj formis mirindan ŝanĝiĝeman mondon. Kial abundas tervarmo en la norda Tibeto? La tibetanoj prave diris: "La princino Wencheng ŝatis tualeton, la stepo do dediĉis multajn termofontojn al ŝi."

Promenante sur Nagqu-stepo, ni aŭdis laŭtan kanton de malproksime. Plugante, kamparanoj ĝoje kantis. Du bovoj tiris stangon, kun la ornamita kapo per ruĝaj silkaj kvastoj kaj kupraj tintiletoj ligitaj ĉirkaŭ la kolo. Ĉe rivereto estas ŝtona muelejo, kie muelilo senĉese turniĝis de akvo. La du bovoj tirantaj stangon, muelilo... tiuj antikvaj kamlaboroj estis enkondukitaj de princino Wencheng en Tibeton. Eĉ nun oni daŭre rakontas la belan historion inter hanoj kaj tibetanoj.

## NAMCO, MAGIA LAGO

Estas mirinde multaj lagoj sur la Nord-tibeta Stepo. Tie kuŝas pli ol 2 000 lagoj. La loko estas eble ununura granda altebenaĵa

lagregiono en la mondo.

La plej ĉarma estas la ĉiela lago Namco. Ĝi kun areo de 2 400 kvadrataj kilometroj, je 4 700 m. super la marnivelo, estas la plej altaltituda lago en la mondo.

Oriente de Namco-lago imponas la monto Nianqingtanggula (Njanĉingtanggula). La neĝkovrita monto sin spegulas en la blua lago. La natura majstraĵo sentigis, ke ni estis kvazaŭ en grandega olepentraĵo, nia koro fariĝis pura kaj oferema kaj ni pli belaj.

Somere sur la verda paŝtejo ĉiujare okazas rajdkonkurso. Tiam la paŝtistoj kun siaj familianoj eliras por 6-7 tagoj. Ni rapidis tien por fari televidan filmon. Ni vidis tre malgrandajn kaj malgrasajn ĉevalojn kaj dekkeljarajn rajdantojn en la konkursejo. La ĉevaloj portis kolorajn silkajojn kaj la malgrandaj rajdantoj portis sur la kapo ĉapelon kun agloplumoj. Je ekpafo la ĉevaloj tuj kuregis sagrapide. Vestoj de la knabinoj okulfrapas. Pro manko de oksigeno sur altebenaĵo, oni spiras malfacile. Tamen tie la knabinoj ĉiu portis kvadratan tukon surkape, kiu ne nur kovris la kapon, sed ankaŭ plejparton de la vizaĝo, vidiĝis nur la du grandaj brilaj okuloj. Mi tuj komprenis ilian intencon. Jen tio estas la plej facila beliga rimedo kontraŭ ultraviolaj radioj.


Alia ŝatata programero en la kunveno estas konkurso pri ŝtonlevo. Mi vidis grandan rondan ŝtonon, sur kiu indikiĝis la ciferoj 149.5 kg. Iu konkursanto, plene streĉinte sian forton, subite kaptis ĝin kaj levis ĝin ĝis alto super la ŝultroj. Li sukcesis. Ŝtonlevo estas tradicia ludo en Tibeto. Ĝi komenciĝis en la tempo de Sunzamkampo kaj daŭris jam pli ol mil jarojn. Ĝi ĉas la longan historion de Tibeto. ■



Nagqu-stepo

Lago sur la altebenaĵo






Poefagoj sur neĝo


Familio sur stepo






Paštistoj de Nagqu

Fenomeno de tervarmo



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



La haveno de Oslo  
de **SIEGFRIED BAIER** (Germanio)

En fagarbaro en printempo

de **MALTE MARKHEDEN** (Svedio)

